

1976 novembro

69-a jaro

n-ro 851 (11)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



Vi trovos

en ĉi tiu numero plurajn artikolojn, kiuj traktas t.n. ne-movadajn temojn (v. la paĝojn 178, 180, 181, 183). Se revuo, kiu estas oficiala organo de organizaĵo, rajtas konfesi tion, ni diru, ke akcentado de tiaj ekstermovadaj temoj estis kaj restas unu el la bazaj konceptoj de la redaktado de ĉi tiu revuo dum la lastaj du jaroj. Tio kompreneble ne estas nova koncepto, sed ĝi tiel malofte realiĝas, ke ĉiufoje kiam ni produktas numeron kun iom da tiaj temoj, ĝi trudiĝas kiel nova koncepto. Nur supraĵa trafolio de 685 resenditaj enketiloj (kiuj troviĝis en nia maja numero) ŝajnas konfirmi, ke la strebado al pli ofta traktado de temoj rekte ne ligitaj al la Movado estas prefero ankaŭ de konsiderinda nombro de niaj legantoj. Cetere, sistema prilaboro de la enketiloj jam komenciĝis.

Bonvolu kun aparta atento trastudi la artikolon pri la ŝanĝoj en la membro-sistemo de UEA (p.179). Estas ja sezono de la kotizpagoj kaj necesas zorge elekti sian membrokategorion antaŭ ol pagi la kotizon. Krome, atentemaj membroj memoros, ke eblas grave plifaciligi la laboron de la Centra Oficejo, se oni sian kotizon pagas pere de la landaj perantoj de UEA. Antaŭdankon!

Enhavo

- 177 Tridek jaroj de Unesko: Idealo, kiu realiĝas (sm)
- 178 Seminario "Lingvo kaj rasismo": Por informi aliajn
- 179 Ŝanĝoj en la membrisistemo de UEA: Simpligo kaj avantaĝo por gejunuloj (V.S.)
- 180 La 9a Pupteatra Internacia Festivalo: Esperanto sen esperantistoj (Spomenka Štimec)
- 181 Lingvaj baroj kaj komputoro
- 182 Institucio Hodler 68: Ok mil guldenoj por subvencioj (M.H. Vermaas), Reehoj: Amara laŭdo (G. Kurucz)
- 183 Disertacio pri Esperanto, Lingvo aŭ dialekto? (D.B. Gregor)
- 184 Impresoj el Japanujo kaj Koreo (E.J. Woessink kaj A. Woessink-Nagata)
- 186 Lerneja bulteno (G. Pirlot)
- 187 Leterkesto
- 188 TEJO-paĝo: Jubilea seminario de GEJ: Dudekan fojon, Antipoda reviviĝo, Fotomozaiko
- 189 Recenzoj ("La doloro", "El la vivo de bervalo sentaŭgulo", "Bhagavad-Gîtâ")
- 190 Laste aperis. . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 191 Belartaj Konkursoj 1976: Printempaj strofoj (Albert Goodheir)
- 192 Someraj Universitataj Kursoj 1976: Kion estonte?, Kalendaro
- 193 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 195 Oficiala informilo, Ekzameno E (B. Golden)
- 196 Anoncetoj

La kovrilo

Nia kovrilpaĝo, samkiel nia ĉefartikolo, omaĝas la 30an datrevenon de la fondiĝo de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo, pli bone konata simple kiel — Unesko. Nun kiel antaŭe, ekde la starigo de la konsultaj rilatoj de UEA kun Unesko, en la Movado troviĝis tiuj, kiuj kritike rilatis al troa akcentado de Unesko kaj al troaj atendoj de la prestiĝa monda organizaĵo rilate la lingvan problemon. Tamen, ankaŭ la lastatempe evoluo de la Esperanto-movado montras, ke la ligo de UEA al Unesko estis ĝusta paŝo, kiu neniel malhelpas paralelan aktivadon en pluraj aliaj kampoj, eble eĉ surbaze de tute novaj konceptoj. Se la Esperanto-movado ne povas multon atendi de Unesko, ĝi certe povas atendi multon de tiu nova mondo por kiu Unesko tiel efike kaj persiste pledas kaj batalas.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto). Fondita en 1905 de Marcel Paul Berthelot (1881-1910).

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendaro jaro: 37,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 50,— gld.) Unuopa ekzemplero 3,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 19,25; Sud-Ameriko 16,50; Suda Afriko, Azio 13,75; Meza kaj Norda Ameriko, Mezoriento, Meza kaj Norda Afriko 11,— gld.

Anonctarifo: 1p. 500 gld. 1/2p. 265 gld., 1/4p. 145 gld., 1/8p. 85 gld., 1/16p. 55 gld. Anonctarifo por ne-Esperantaj komercaj entreprenoj estas duobla. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, Rotterdam-3002 (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj kulturo: D-ro H. Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne PA 19050, Usono; tel. (215) CL9-8821.

Vicprezidanto kaj estrarano pri landa kaj regiona agado: D-ro W. Bormann, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FR Germanio; tel. (040) 7384508.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado: Prof. d-ro C. Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; tel. (472) 448085.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri administrado, komerco, industrio kaj diskonigo de UEA-agado: E.L.M. Wensing, Dennenstr. 9, B-3581 Achel, Belgio; tel. (011) 643150.

Estrarano pri la delegita reto, rilatoj kun Esperanto-organizaĵoj kaj pri specialaj agadoj: D-ro P. Denoël, rue Victor Raskin 20, B-4000 Liège, Belgio; tel. (041) 270079.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-rino F. Szabó-Felső, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungario; tel. (072) 16725.

Estrarano pri informado kaj turismo: S. Świstak, Poŝtfako 901, PL-30-960 Krakow 1, Pollando.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp-6200, Nederlando; tel. (085) 137412.

Idealo, kiu realiĝas


KIAM MALLONGIGO fariĝas simpla nomo, ordinara vorto en preskaŭ ĉiuj lingvoj parolataj en la hodiaŭa mondo, tio estas klara signo de maksimuma populariĝo. U.N.E.S.K.O. iam estis mallongigo de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo, nun ĝi estas simpla vorto, vaste konata nomo al kiu ankaŭ la Esperanto-movado referencas en sia ĉiutaga aktiveco.

Fondita de 20 ŝtatoj la 4an de novembro 1946, kun jara buĝeto de 7 milionoj da usonaj dolaroj, en la 30 jaroj de sia ekzistado Unesko kreskis al la plej granda specialigita organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj kaj nuntempe membrigas 136 landojn, havante buĝeton de 170 milionoj da usonaj dolaroj kaj engaĝante preskaŭ same tiel grandan sumon da monrimedoj el aliaj fontoj. Pli ol 360 neregistaraj internaciaj organizaĵoj — UEA estas unu el ili — intime kunlaboras kun Unesko. En 127 landoj funkcias naciaj Unesko-komisionoj, kiuj en siaj teritorioj kunordigas la aktivadon de la monda organizaĵo. La Sekretariato de Unesko, en Parizo, konsistas el 1811 oficistoj (el 111 landoj) kaj 1693 specialistoj, el kiuj iom pli ol duono laboras por la diversaj Unesko-projektoj tra la tuta mondo. Unesko estas mamuta organizaĵo, sed eble ne tiom, kiom postulas la giganta laboro, kiun ĝi plenumas.

Ekde la 25a de novembro 1954, kiam UEA akiris konsultajn rilatojn kun Unesko, kaj precipe post la jam fama Rezolucio de Montevideo (de la 10a de decem-

bro samjare), la okuloj de la tutmonda Esperanto-movado estis kaj ankoraŭ ĉiam restas turnitaj al la monda organizaĵo por edukado, scienco kaj kulturo. Unesko estis la ĉefa stampo de tiu epoko en la lastatempa historio de UEA, kiu ligiĝas al la nomo de la antaŭa prezidanto de UEA, prof. d-ro Ivo Lapenna, la ĉefarkitekto de la rilatoj inter Unesko kaj UEA. Ankaŭ dum la lastaj du jaroj la agado de UEA ĉe Unesko ne nur ne malgrandiĝis, sed ĝi en pluraj rilatoj fariĝis pli intensa kaj eble ankaŭ pli celtrafa, kion ankoraŭ devos konfirmi la estonteco. La tuta laborgrupo, kiu sub la gvido de s-ro E. Chicot prizorgas en Parizo la rilatojn kun Unesko, aktive partoprenas en ĉiuj kunsidoj, kiuj iel rilatas la neregistarajn organizaĵojn. Aldone al la regulaj kunsidoj, kiujn la pariza laborgrupo ĉeestas ĉe Unesko, lastatempe la reprezentantoj de UEA aktive partoprenis en pluraj specialaj kunvenoj, kiel ekz. preparakunsido por la baldaŭ okazonta Simpozio pri la Nova Ekonomia Ordo. Ankaŭ en tiu kunveno la reprezentantoj de UEA atentigis pri la lingvaj malhelpoj en la ekonomia evoluigo kaj pri la risko de la dominado de la angla kaj aliaj eŭropaj lingvoj sur ĉi tiu kampo. Sekve de la peto, kiun la ĝenerala direktoro de Unesko direktis al ĉiuj ĉefaj neregistaraj organizaĵoj, sendi siajn komentojn pri la programo de la monda organizaĵo por la laborjaro 1977-78 kaj pri la kvinjara laborplano de Unesko por la periodo 1977-82, UEA antaŭ kelkaj monatoj sendis al Parizo tre detale argumentitan komenton (20 paĝoj) pri la monda lingva situacio kaj pri la pozicio de la neregistaraj organizaĵoj rilate la laboron de Unesko. En la 19a Ĝenerala Konferenco de Unesko (tiaj konferencoj okazas ĉiun duan jaron), kiu komenciĝis la 26an de oktobro en Nairobi, la ĉefurbo de Kenjo, la reprezentanto de UEA estas d-ro R.G. Robbins, kiu laboras ĉe la Universitato de Nairobi kaj estas dumviva membro de UEA.

La Ĝenerala Konferenco de Unesko en Nairobi nek traktos nek solvos la lingvan problemon de la hodiaŭa mondo. Ĝi tamen plian fojon spertos ĝin kaj eble eĉ estos rekte atentigita pri ĝi. Ĉar Unesko estas juna, dinamisma kaj moderna organizaĵo, ĉar ĝi plurfoje montris, ke ĝi havas kuraĝon kaj klarvidon, kiuj ofte mankas al multaj aliaj internaciaj organizaĵoj, necesas fidi, ke la lingva problemo foje troviĝos en la tagordo de Unesko. La senkompromisa batalo de Unesko kontraŭ koloniismo, analfabeteco, rasa kaj kultura diskriminacioj kondukas rekte al foja pritrakto ankaŭ de la lingvaj diskriminacio kaj egalrajteco. Cetere, jam nun la nombro de oficialaj kaj laboraj lingvoj ĉe Unesko superas similajn nombrojn ekz. ĉe Unuiĝintaj Nacioj. Tio estas nur detaletto, sed ĝi estas esenca detaletto, montranta, ke Unesko estas pli konscia pri la monda lingvo-problemo, ol estas aliaj grandaj internaciaj organizaĵoj. Tamen, ne sufiĉas nur fidi, ke Unesko foje funde okupiĝos pri la lingva diskriminacio. Necesas labori kaj kunlabori en tiu direkto. Unesko estas idealo, kiu realiĝas. Ĝi ankoraŭ ĉiam kaj prave restas ankaŭ unu el la idealoj de la Esperanto-movado.



Se 'k' en la nomo de Unesko simbolas kulturon, ĝi devus duobliĝi pro la nuna atento de Unesko al la komunikado.

Por informi aliajn

Tuj post la Universala Kongreso en Ateno, inter la 12a kaj 16a de aŭgusto 1976, en Sarajevo (Jugoslavio), okazis grava internacia seminario pri la temo "Lingvo kaj rasismo". Ĉar ni ankoraŭ ne disponas pri detala raporto pri tiu aranĝo, ni klopodis kompili iom da informoj el nacilingvaj gazetartikoloj, kiuj informis pri la seminario.

INTERNACIA SEMINARIO "Lingvo kaj rasismo" okazis en la kadro de la "Jardeko de aktivado por kontraŭbatali rasismoj kaj rasan diskriminacion", kiun en sia speciala kunveno lanĉis la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj, la 10an de decembro 1973, okaze de la 25a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (v. nian revuon, majo 1974, p.86). La organizanto de la seminario estis Jugoslavia Esperanto-Ligo pere de sia regiona organizaĵo en Sarajevo. La aranĝo okazis sub la aŭspicioj de la Jugoslavia Unesko-Komisiono kaj kun tre forta morala kaj materia apogo de pluraj sociaj kaj politikaj instancoj de la jugoslavia respubliko Bosnio kaj Hercegovino.

La labora parto de la seminario, okazinta en la sarajeva hotelo "Bristol", disvolviĝis en tri sekcioj: a) ĝenerala problemaro, b) problemoj de lingvaj minoritatoj, c) rolo de la Internacia Lingvo. En la fino de la seminario okazis rondtabla debato pri "Lingvopolitiko".

Al la seminario, kiu ne estis planita kiel amasa aranĝo sed kiel scienca laborkunveno, venis ĉ. 60 partoprenantoj el Aŭstrio, Belgio, Britio, FR Germanio, Hungario, Italio, Japanio, Jugoslavio, Meksikio, Nederlando, Svislando, Sudano kaj Usono. Kvankam la seminario estis anoncita nur iam komence de ĉi tiu jaro, la organizantoj ricevis tridekon da referaĵoj, el kiuj oni intencas redakti apartan librovolumon. Inter la kontribuintoj troviĝas pluraj jam bone konataj nomoj en la Esperanto-movado: profesoroj B. Popović, R.E. Wood, J. Knappert, d-ro P. Zlatnar, inĝ. H. Bakker, d-ro R. Corsetti, inĝ. P. Bagger k.a. Krome, la seminario allogis plurajn eminentajn specialistojn (precipe el Jugoslavio), kiuj ĝis nun estas malmulte aŭ tute ne konataj en la Movado: prof. d-ro Boris Grabnar (jam delonge esperantisto), prof. d-ro Melanija Mikeš, prof. d-ro B. Korubin, prof. d-ro T. Veiter, prof. A. Verdoodt k.a. Inter la temoj de la referaĵoj aparte interesaj ŝajnas jenaj: "Lingvo kaj rasismo en la tropikaj landoj" (Knappert), "Kontraŭrasismaj tendencoj en la jugoslavia modelo de plurlingvismo" (Mikeš), "Lingva imperiismo" (Veiter), "Sekvoj de lingva superregado" (Bakker), "Literatura lingvo kiel nacia normo" (Korubin), "Lingvo kiel diferencigilo de etnaj minoritatoj" (Albina Lük), "Lingvaj problemoj de fremdaj laboristoj kaj socilingvistikaj problemoj de infanoj de fremdaj labor-

istoj en edukado" (Verdoodt), "Juraj aspektoj de la lingvo-etnaj problemoj" (A. Peleš), "Lingvo, raso kaj etna idento en Usono kaj Kanado" (Wood), "Etna pozicio de slovenoj en Italio" (S. Pahor), "Situacio de la albana lingvo en Jugoslavio" (A. Byci), "Teknologio de komunikado kaj la Internacia Lingvo" (Grabnar) kaj "Ebla rolo de neengaĝitaj landoj en pli justa lingvopolitiko" (Corsetti).

Kvankam oni dum la seminario ofte emfazis la pozitivajn aspektojn de la jugoslavia sperto pri plurlingveco kaj lingva egalrajteco, ne mankis tie ankaŭ kritikaj observoj pri ĝi. En sia referaĵo d-ro P. Zlatnar atentigis, ke malgraŭ la konstituciaj kaj aliaj garantioj, la slovena lingvo en la praktiko montriĝas ne-egalrajta, precipe en la sfero de ekonomia kunlaboro, kie trudiĝas elito de teknokratoj kaj burokratoj, kiuj konas la t.n. grandajn lingvojn, kaj tiel en la jugoslavia kazo malhelpas, ke la produktantoj povu rekte trakti kun la parteneroj aspektojn de sia produktopolitiko.

Estas menciinde, ke la partoprenantoj de la seminario sendis apartan salutmesaĝon al la 5a konferenco de eksterblokaj landoj, tiutempe okazanta en Kolombo. Kvankam, laŭ la nivelo de sia programo, la seminario "Lingvo kaj rasismo" ŝajnas esti unu el la plej interesaj kaj gravaj okazintaĵoj dum la lastaj monatoj, ĝi ankoraŭ ne ricevis merititan atenton en la Esperantomovado. Cetere, eble tion eĉ celis la organizantoj de la seminario, ĉar grave estis, ke la neesperantista publiko informiĝu pri la temoj traktitaj en Sarajevo; en la Movado oni ja ĉiukaze relative ofte traktas tiajn temojn kaj esperantistoj tial estas pli bone informitaj pri la lingva problemaro, ol estas la neesperantista publiko.

Eldonaĵo de UN en Esperanto

EN JULIO 1975, la Informa Oficejo de Unuiĝintaj Nacioj en Kopenhago aperigis multobligitan raporton en Esperanto pri la Internacia Virina Jaro. En decembro sekvis, ĉi-foje de la Oficejo de Publika Informado ĉe la Sekretariato de UN en Nov-Jorko, multobligita Esperanta traduko de la Deklaracio pri la Donado de Sendependeco al Koloniaj Landoj kaj Popoloj.

Tiuj komencaj provetoj nun kondukis al aperigo de la 5a eldono de la Esperanta traduko de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. La antaŭajn eldonojn prizorgis UEA (inter 1963 kaj 1968 en suma eldonkvanto de 15 000 ekzempleroj), sed tiun ĉi eldonon aperigis en formo de presita faldfolio la Oficejo de Publika Informado. Temas pri la unua fojo, ke instanco de UN en Nov-Jorko presigis tekston en Esperanto, kaj ĝi estas la unua signo de la fortiĝanta pozicio de UEA ĉe la Sekretariato de UN. La Deklaracio estas akirebla ĉe: Oficejo de Publika Informado, Unuiĝintaj Nacioj, New York, N.Y. 10017, Usono, aŭ ĉe la landaj informaj oficejoj de UN.



La nova membrisistemo, kiu ekvalidos por 1977, prezentas plurajn avantaĝojn por la junaj membroj de la Asocio.

ŜANĜOJ EN LA MEMBROSISTEMO DE UEA:

Simpligo kaj avantaĝo por gejunuloj

EKDE LA 1-A DE JANUARO 1977 okazas kelkaj gravaj ŝanĝoj en la kategorioj kaj kotizoj de la individuaj membroj de UEA. La ŝanĝoj estis ĉiuj aprobitaj de la Komitato de UEA jam en 1975 en Kopenhago, sed ili ekvalidos nur por la nova kotizojaro 1977.

Unuavice temas pri simpligo de la junularaj kategorioj kaj **malaltigo** de du aliaj kotizoj. Por la granda plimulto de la individuaj membroj — la membroj-abonantoj — nenio ŝanĝiĝos.

Junaj membroj. Kiu atente rigardis la kotiztabelon en la oktobra numero, tiu jam rimarkis, ke tute ne plu ekzistas **apartaj kotizoj** por junaj membroj. Ĝis nun, ekzistis ne nur du apartaj kotizoj (12,50 kaj 37,50 gld.), sed ankaŭ du malsamaj aĝlimoj (21 kaj 25 jaroj) kaj tri apartaj kategorioj (J-MJ, J-MA kaj MA-K). Ekde 1977, ĉiuj membroj pagos la samajn kotizojn senkonsidere al la aĝo. La granda diferenco estas, ke la novaj kategorioj MJ-K kaj MA-K, t.e. personoj ĝis inkluzive 25-jaraj, aŭtomate ricevos, sen plia pago, la revuon *Kontakto*. Necesas nur indiki la naskiĝdaton, kiam oni pagas la kotizon. La aĝlimo de 21 jaroj ne plu havas ian signifon: validas nur tiu de 25 jaroj, kiu estas samtempe la statuta aĝlimo por membreco de

TEJO. La nova aranĝo estas aparte favora por tiuj gejunuloj, kiuj deziras ricevi la *Jarlibron* kaj *Kontakton*, sed ne la revuon *Esperanto*. Ili pagos la kotizon de MJ-K kaj ŝparos preskaŭ 50% kompare kun la antaŭa tarifo.

Kotizoj malaltigitaj. Ekde 1977 malaltiĝas la kotizoj MJ (membro kun *Jarlibro*) kaj SA (simpla abonanto de *Esperanto*). La kotizo de MA (membro-abonanto), kiu ricevas la revuon kaj la *Jarlibron*, restas senŝanĝa je 50,— gultenoj. MJ falas de 25,— al 20,— gld. kaj SA falas de 37,50 al nur 30,— gld., tiel ke nun MJ + SA = MA: per aliaj vortoj, la plena kotizo por membreco, *Jarlibro* kaj revuo estas la simpla sumo de la apartaj kotizoj por membro kun *Jarlibro* kaj abono je la revuo. (En pluraj landoj jam ekzistas kolektivaj aranĝoj, per kiuj la membroj de la koncerna landa asocio povas ricevi la revuon *Esperanto* je aparte favora prezo. La malaltigo de la kotizo MJ celas precipe faciligi al tiuj personoj resti aŭ fariĝi individua membro de UEA. La malaltigo de la kotizo SA celas plifaciligi la varbadon de abonoj por *Esperanto* kaj fari la revuon pli konkurenca kun aliaj gazetoj.

Nova regulo. La Ĝenerala Regularo de UEA antaŭe postulis, ke delegito kaj komitatano de UEA devas esti minimume membro-abonanto (MA). La celo de tiu regulo estis, kompreneble, ke tiaj personoj nepre ricevu la revuon kaj *Jarlibron* por esti bone informitaj pri la laboro de la Asocio. Sed la enkonduko de kolektivaj abonoj en kelkaj landoj ebligis al multaj membroj ricevi la revuon kaj *Jarlibron*, sen la bezono pagi kotizon MA. Evidente, laŭ la spirito de la regularo, ankaŭ tiaj membroj povas ofici kiel delegito aŭ komitatano, kaj per modifo de la Ĝenerala Regularo la Komitato jam agnoskis tion.

Societo Zamenhof. Origine, tiu aparta societo por financa subteno al UEA anstataŭis la malnovan membro-kategorion de membroj-subtenantoj (MS). Tamen montriĝis, ke ankaŭ tre multaj dumvivaj membroj deziras esti membroj de Societo Zamenhof. Krome estas antaŭvidata varbado por la Societo ankaŭ inter simpatiantoj, kiuj ne mem parolas Esperanton kaj ĉiuokaze ne estas individuaj membroj de UEA. Pro ĉio ĉi, estas decidite tute sendependigi la membrecon en Societo Zamenhof disde la membreco en UEA. Sekve de tio, en la kotiztabeloj aperas nun aparta kolumno por la **aldona pago** por Societo Zamenhof, kiu **ne** inkluzivas la normalan membro-kotizon de UEA.

Dumviva membreco. Por fariĝi dumviva membro oni devas estonte pagi 25xMA, t.e. $25 \times 50 = 1250$ gultenoj. Antaŭe la kotizo estis nur 20xMA, sed la rapideco de la inflacio en la lastaj jaroj kaŭzis, ke oni devas serioze dubi, ĉu la rento ricevebla el tia kapitala sumo povos estonte kovradi la kostojn.

*

La kelkaj ŝanĝoj nun enkondukataj en la membrisistemo signifas realan simpligon de la administrado. Ĉar la sistemo fariĝis pli simpla, ĝi estos ankaŭ pli facile prezentebila, kaj tio espereble havos siavice pozitivan efikon en la varbado de novaj membroj.

Esperanto sen esperantistoj

Por emfazi kelkajn alarmajn konstatojn, kiujn pri la movada indolento faras ĉi tiu raporto, ni aldonu, ke la estrarano pri kulturo de UEA dissendis i.a. al ĉiuj landaj asocioj dufoje ĉi-jare (en aprilo kaj en septembro) apartan cirkuleron pri pup-teatroj kaj Esperanto.

JAM NAŬ JAROJN, ĉiuoktobre aperas sur la publikaj reklamtabuloj en Zagreb (Jugoslavio) okulfrapaj afiŝoj en la Internacia Lingvo. Temas pri la anoncoj por Pupteatra Internacia Festivalo (PIF), kiu fariĝis konsista parto de la zagreba porinfana kulturo. Ne hazarde por la okazigo de PIF estas elektita la t.n. Internacia Infana Semajno, kiu en Jugoslavio manifestiĝas per intensigo de porinfanaj kulturajoj.

Dum la antaŭaj jaroj, la organizanto de PIF — Internacia Kultura Servo — venigis al la festivaloj entute 63 profesiajn pupteatrojn, kiuj ludis 315 prezentaĵojn, el kiuj 278 en Esperanto. Per sia Esperanta mallongigo PIF fariĝis konata nocio en la zagreba kultura medio; ĝi samtempe iĝis de unuj subtenata, de aliaj malagnoskata. Dum naŭ jaroj oni laŭdas ĝian artan kvaliton kaj demandas pri kialo de la ĉeesto de Esperanto. La atakoj estas kliŝaj: artefariteco, nesufiĉa kreopovo, kial ne naciaj lingvoj aŭ la angla "por ke ĉiu komprenu...". Montriĝis tamen, ke la atakoj malakriĝis, dum PIF, per sia obstina ekzisto, sukcesis atentigi la publikon pri ebleco demokratigi la naciajn kulturojn per Esperanto kaj prezenti ilin eksterlande.

Kompare kun la antaŭaj jaroj, la ĉi-jara PIF (inter la 4a kaj 9a de oktobro) estis ekstreme modesta: ĝin partoprenis nur 6 pupteatroj, el kiuj 3 eksterlandaj, el: Biel-sko-Biaĵa (Pollando), Braĵila kaj Braŝov (ambaŭ Rumanio), kaj enlandaj el tri jugoslaviaj respublikoj: Kroatio, Serbio kaj Slovenio. Dum la festivala semajno okazis en Esperanto nur 30 prezentaĵoj, kiujn vidis ĉ. 4 500 spektantoj el Zagreb kaj apudaj urbetoj.

Parto de la publiko estis lernantoj-esperantistoj, kiujn PIF venigis al paralele okazinta internacia renkontiĝo (partoprenis 30 infanoj el Belgio kaj Hungario). La infanoj mem prijuĝis la prezentaĵojn kaj premiis ilin, sed ankaŭ mem prezentadis siajn pupprogrametojn, kiujn ili preparadis dum pluraj monatoj. Specialan laŭdon ricevis "Griĉjo Musmus", prezentita de etuloj el la hungara urbo Komlo.

Kvankam tre modesta kaj sen adekvata reeĥo en la jugoslavia gazetaro (nur televido kaj radio abunde raportis pri ĝi), PIF ankaŭ ĉi-jare montris sian popular-



Ili pli bone ol plenkreskuloj komprenas la gravecon de la festivalo: Hungaraj infanoj ekzercas por la 9a PIF.

econ ekster la jugoslaviaj landlimoj: La festivalon ĉeestis tri reprezentantoj de la Ambasadro de Ĉinio kaj delegito de la rumana kulturministerio. Por la venontjara jubilea PIF ekzistas jam granda intereso: Estas anoncitaj teatroj el Ĉinio kaj Alĝerio, krom deko da eŭropaj, ĉefe festivalaj veteranoj.

La 9an PIF karakterizis pli rutino ol entuziasmo; ĝi estis festivalo de kontinueco. Tamen, kelkaj ĝiaj kontribuaĵoj montriĝis vere valoraj. La plej multajn laŭdojn ricevis la teatro el Niŝ (Jugoslavio) por *Mi rakontas al vi rakonton*. Per patriotisma spektaklo *Tri domoj, tri vojoj*, la teatro el Braĵila gajnis la premion "Tibor Sekelj" por la plej homama festivala mesaĝo. Per la premio por novaj esploroj en pupteatra arto estis distingita la ensemblo el Braŝov. Stimulante la pupistojn uzi Esperanton, la organizantoj ĉi-jare lanĉis ankaŭ monpremiojn, individuajn kaj kolektivajn (de 500 ĝis 2500 dinaroj), kio evidente helpis la kreon de kelkaj novaj pupistoj-esperantistoj. Tio montriĝis nova logilo en klopodoj interesi profesiulojn pri la Internacia Lingvo. Por pravigi la monpremiojn, oni parolas ankaŭ pri pli facila interkompreniĝo de festivalanoj kaj — pri internacia publiko. Fakte, 30 eksterlandaj lernantoj-esperantistoj kaj centoj da jugoslaviaj samaĝuloj ne estas sufiĉa pruvo pri ekzisto de Esperanto-parolanta publiko.


Paradokse estas, ke festivalon en Esperanto subtenas nek eksterlandaj nek enlandaj movadanoj; ĝi gajnas ĉiam pli da intereso kaj subteno ĉe neesperantistoj. Restas do la demando: Ĉu esperantistoj forlasas eventojn en Esperanto aŭ, ĉu Esperanto forlasas ilin?

Spomenka Ŝtimec

Lingvaj baroj kaj komputoro

Ni transprenas ĉi tiun tekston el la anglalingva periodaĵo "Siemens News", somero 1976. Pluraj vidpunktoj kaj eĉ nombroj, menciitaj ĉi tie, estas pridubindaj. Tamen, la teksto bone ilustras la urĝecon per kiu la lingva problemo sin trudas.

HODIAŬ estas uzataj en la mondo eble 5 000 diversaj lingvoj kaj dialektoj, kun tre diversaj vortprovizoj. La ĝenerala germana lingvo utiligas ĉ. 300 000 vortojn, dum la angla uzas duoble tiom. En la diversaj fakterminaj kampoj la vortaro estas multoble pli ampleksa. Oni ekz. taksas, ke nuntempe estas uzataj ĉ. kvar milionoj da terminoj sur la kampo de elektrotekniko, inkluzive de informsystemoj kaj komunikado. Neniu povas esperi pri prilaboro de tiel nekredeble granda nombro da terminoj per tradiciaj rimedoj. Pro tio la "Lingvaj servoj" de Siemens en Munkeno decidiĝis en 1967 provi solvi tiun problemon per la helpo de komputoroj. La programsistemo SART (Sistemo por Analizo kaj Registrado de Terminoj; anglalingve: Terminology Evaluation and Acquisition Method = TEAM), kiun sekve ellaboris tiu fako de Siemens kaj subvenciis la Ministerio de Esploro kaj Teknologio de FR Germanio ekde 1970, ĝenerale celas havigi teknikajn terminojn kaj ĉiaspecajn rilatajn informojn, en formoj utiligeblaj por ĉiuj. Ĝi ankaŭ celas normigi la jam ekzistantan terminaron. Per tio ĝi plibonigas la tutmondan komunikadon interne de la firmo Siemens kaj ankaŭ inter Siemens kaj ĝiaj internaciaj partneroj.



Komputoro antaŭ la lingvaj baroj: Ĉu la mito pri komputora ĉiopovo proksimiĝas al sia fino?

Ĝis nun, proksimume du milionoj da teknikaj terminoj en la lingvoj germana, angla, franca, hispana, rusa, itala, portugala kaj nederlanda jam estas registritaj en la SART-informbanko, kune kun siaj fontoj, difinoj, kuntekstoj kaj aliaj kriterioj, kiuj povas esti gravaj por la uzanto. La terminaron oni povas konsulti iam ajn, en ĉiu ajn formo, kombino kaj aranĝo, laŭ la postuloj. Unuopaj terminoj kaj iliaj ekvivalentoj en aliaj lingvoj povas esti montrataj sur monitora ekrano aŭ teletajpilo. Kompletaj listoj de terminoj laŭ alfabeto ordo povas esti presitaj pere de altrapida tajpilo.

Lastatempe inventita teknikaĵo ebligas, ke la informoj estu rekte transigitaj sur mikrofilmon aŭ mikroslipojn. Kaj por pli oportuna, pli kompakta prezentado, eblas utiligi la fototajpilon "Digiset CRT", kiu transigas la deziratajn informojn sur fotografian paperon aŭ filmon. Tiu fotografia transigo okazas je tia rapideco, ke vortaro de ĉ. 600 paĝoj povas esti tajpita en malpli ol du horoj. Utiligante tiun ĉi metodon, la sekcio "Lingvaj servoj" produktis plurajn vortarojn, elektitajn el ĝia terminologia informbanko kaj tajpitajn tute aŭtomate. Inter ili estas vortaro pri informsystemoj en la germana kaj angla lingvoj. Baldaŭ aperos vortaro pri kablo-tekniko en la germana, angla kaj franca, kompilita kunlabore kun la tradukservo de la Kablo-Fabrikoj en Berlino, kaj vortaro pri elektraj maŝinoj, kompilita de la traduksekcio de la Energi-Tekniko kaj la Grupo Elektraj Instalaĵoj, en Erlangen (FR Germanio).

Konsiderante la enormajn kvantojn da vortoj kaj terminoj, oni komprenas, ke neniu kompanio aŭ institucio kapablos, sole kaj memstare, akiri ĉiujn teknikajn terminojn ekzistantajn, nek teni sian terminologian provizon ĝisdata. Sin trudas la urĝega neceso de streĉa kaj intima kunlaboro sur tiu ĉi tereno, je internacia skalo, inter industrio, registaroj kaj publiko, plus, krome, privataj institucioj. Terminologiaj bankoj, se oni volas, ke ili estu certgrade kompletaj, ĝisdataj kaj teknike fidindaj, povas esti establataj nur de multaj asociiĝintaj partneroj, laborantaj kune kaj sin helpantaj reciproke, dividante inter si la gigantajn ŝarĝojn de laboro. Estas precize en tiu ĉi kunteksto, ke ni menci la aktivecon de Unesko, kiu organizis laborgrupojn pri sistem-interkonektadoj kaj terminologio ekde la jaro 1972.

La sekcio "Lingvaj servoj" de Siemens okupiĝas pri tiaspeca kunlaborado en vasta skalo, strebante al kunordigita sistemo, en kiu pluraj terminologiaj informbankoj estos interligitaj. La sistemo funkcias laŭ la principo de reciproka interŝanĝo de informado, kaj ĉiu unuopa partnero kontribuas sian specifan terminologion, kiu poste estas alirebla por ĉiuj aliaj. La sekcio "Lingvaj servoj" jam kunlaboras kun diversaj partoprenantoj, kiel industriaj entreprenoj, publikaj kaj registaraj institucioj, inter kiuj troviĝas laborgrupoj pri normigado de nocioj. Tiu grupo daŭre kreskadas, ĉar la neceso de kunlaboro estas sentata de ĉiu, kiu alfrontas la problemojn de internacia komunikado sur teknikaj kampoj.

Tradukis el la angla:
E.L.M. Wensing

Ok mil guldenoj por subvencioj

DANK' AL FIDELAJ PRUNTANTOJ kaj donacintoj, Kapitalo Hodler 68 produktis dum 1975 sufiĉe da rento por disponigi la netan sumon de 8 000 guldenoj por helpi al diversaj instancoj de la Esperanto-movado. Laŭ decido de la Estraro de Instituto Hodler 68, la mono estas jene dividita:

Fondaĵo prof. Canuto: 3 000 guldenoj, por pagi kotizojn de membro-abonanto precipe en landoj de la t.n. Tria mondo.

Akademio de Esperanto: 1 000 gld., precipe por kovri parton de la kostoj de *Aktoj de la Akademio II*.

Kanada Esperanto-Asocio: 1 000 gld., por helpi ĝian ampleksan projekton pri agado dum la ĉi-jaraj Olimpikaj ludoj.

Projekto Corsetti: 1 000 gld. por distribui la libron *Paŝoj al plena posedo* en la landoj de la t.n. Tria mondo.

Someraj Universitataj Kursoj: 700 gld. por ĝenerala uzo, kun noto, ke la antaŭa subvencio — tiam ne uzita — de Instituto Hodler 68, nome stipendioj por du studentoj, restas je dispono de la nuna sesio.

Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj: 500 gld. por ĝenerala uzo.

Komisiono por Eksteraj Rilatoj (KER) de TEJO: 500 gld. por ĝenerala uzo.

Portugala Esperanto-Asocio: 300 gld. por unufoje daŭrigi la helpon por aperigo de ĝia organo, kiu efektive komencis reaperi, dum la Asocio luktas ankoraŭ en malfacilaj cirkonstancoj.

Ju pli da pruntoj, des pli da rento je dispono por subvencioj en estontaj jaroj. Tial ĉiu, kiu hazarde havas en banko aŭ aliloke sumon de 1 000 gld. aŭ egalvaloro, ne tuj bezonatan, sendu ĝin prunte al Instituto Hodler 68, al ĝia poŝtĉekkonto n-ro 168 75 44 en Nederlando, aŭ al ĝia bankkonto n-ro 25.50.51.816 ĉe Bank Mees & Hope, Rotterdam.

M.H. Vermaas, administranto,
Nieuwe Binnenweg 70, I.r., Rotterdam

Redakcia noto: Ni ricevis ĉi tiun raporton antaŭ kelkaj monatoj, sed, pro la specifeco de pluraj lastatempaj numeroj de la revuo, ni bedaŭrinde ne sukcesis publikigi ĝin pli frue.

REEĤOJ:

Amara laŭdo

RICEVINTE la numeron 847-8 de *Esperanto* oni trovis en ties plena amplekso la estraran jarraporton de UEA. Kun ĝojo mi kvitancas la iniciaton: La raporto estas kiel eble vaste publikigenda. La fakto, ke ĉiu povis ĝin trastudi antaŭ la Kongreso plialtigas ĝian valoron. Mi persone akceptas la raporton kaj konstatas, ke nia estraro laboris supermezure multe por la afero de la Internacia Lingvo kaj, ke sendube montriĝas sukcesoj, precipe sur la financa kampo. Tamen, permesu al mi esprimi du modestajn konstatojn.

Unue: Mi trovas plorinda, ke la estrara raporto plene neglektas tre gravan laborterenon, la instruadon de Esperanto. Estante instruisto kaj aktivante ĉefe en tiu kampo, mi serĉis ĝin, kompreneble, kaj vidinte, ke ĝi estas tute prisilentita, konsterniĝis. Ĉu la instruado fariĝis lastatempe tiel bagatela flanka afereto, ke ĝi meritas preskaŭ kompletan neglekton? Aŭ, ĉu la instruistoj, la plej multnombra bazo de nia membraro, dormas profunde? Ĉu ili atingis nenion en la lasta jaro? Ne eblas! Kaj se estas tiel, ĉu la estraro rajtas preterrigardi evidentajn mankojn?

Komence mi opiniis: silentu! Kiel instruisto vi tro alte taksas la signifon de la lingvoinstruado, estu iom objektiva, ne serĉu ĉie vian temon, troviĝas ja multaj diversaj terenoj, kie oni devas serioze labori. Fine,

tamen, evidentiĝis, ke nia estraro deziras solvi la enkondukon de Esperanto **de supre**: en UN aŭ Unesko, en ministerioj, per ŝtataj dekretoj ktp. Neniu dubas pri la neceso aktivadi tie, sed ne forgesu: Estas grava peko lasi elgliti la alian flankon, t.e. agadon **malsupre**, des pli, ke ekde Zamenhof pluraj elstaruloj jam avertis la esperantistojn: de rutinemaj registaroj atendi multe ne eblas. Por klini ilin al nia afero, necesas forta premgrupo. Ni simple akceptas la fakton, ke la membraro daŭre falas, ni elfabrikas diversajn teoriojn, silentante pri la plej verŝajna kaŭzo, nome: ni ne akcentas sufiĉe la gravecon de la lingvoinstruado kaj de la edukado.

Due: Plurfoje mi skribis pri ekonomia uzo de nia forto, tute vane. Eble tion legis neniu. Tre povas esti. Ni ne direktu nian malgrandan energion al cent diversaj terenoj! Kion ni atingas? Necessas elekti la **ĉefajn** taskojn, kiuj ĉe sukceso aŭtomate posttrenos novajn farendaĵojn. Pri kio mi aludas? Ni denove legas multe en la jarraporto: kiuj propagandis, kiuj verkis bonajn artikolojn, t.e. liston de nomoj, aron da iniciatoj. Des malpli ni legas pri efektivaj atingoj.

G. Kurucz, Hungario

KOREKTO

En la oktobra numero de la revuo, p. 164, estas erare indikite, ke la konkursaĵoj por la Belartaj Konkursoj devas esti senditaj en 3, anstataŭ korekte — en KVAR ekzempleroj.

Disertacio pri Esperanto

LA 16AN DE JUNIO 1976, Detlev Blanke, estro de la sekcio Esperanto en Kulturligo de GDR kaj sekretario de Centra Laborrondo, defendis sian doktorigan disertacion antaŭ la sociscienca fakultato (sekcio germanistiko) de Humboldt-Universitato en Berlino (GDR). La disertacio, kiu konsistas el du volumoj (170p. + 26 tabeloj; notoj kaj bibliografio 74p.) portas la titolon: "Planlingvo kaj nacia lingvo, kontribuo por esplorado de iliaj specifaj komunikadaj potencoj, montrita per konfronta komparo de kelkaj problemoj el la vortfarado de Esperanto kaj la germana lingvo" (Plansprache und Nationalsprache, ein Beitrag zur Erforschung ihrer spezifischen Kommunikationsleistungen, gezeigt am konfrontativen Vergleich einiger Probleme der Wortbildung des Esperanto und des Deutschen).

La disertacio i.a. klare montras, ke konscia efikado de la homo je la instrumento lingvo estas tre disvastigita (lingvo-planado), substrekas la fakton, ke sole Esperanto funkcias kiel planlingvo kaj sekve nur ĝi estas explorebla kiel lingva fenomeno. Plue, Blanke pritraktas kelkajn bazajn problemojn de la vortteorioj de

Esperanto kaj de la germana lingvo (morfeminventaro, signifo de la vorto, kombineblo de morfemoj al morfemkonstruaĵoj, motivigo de la signifo de vortoj, nacia influo je la signifo de la vorto en Esperanto, lingva ekonomio). La ĉefa parto de la disertacio pritraktas la plej gravajn konstrumodelojn de substantivo, adjektivo kaj verbo en la komparataj lingvoj. La disertacio, kiu indikas preskaŭ 400 fonto-verkojn, estas ekspertizita de la profesoroj d-ro Erwin Arndt (germanisto), d-ro Viktor Falkenhahn (slavisto-esperantologo), ambaŭ de Humboldt-Universitato, kaj de d-ro M.J. Isaev (interlingvisto), Moskvo.

Tiu doktora disertacio pri "kompara lingvistiko-esperantologio", apartenas al la vere tre malmultaj disertacioj entute, kiuj ĝis nun estas verkitaj pri Esperanto en internacia skalo (Wüster, Manders). Ĝi vekis neantaŭvidite pozitivan eĥon en lingvistaj rondoj kaj sendube malfermos la pordon al pluaj seriozaj sciencaj aktivecoj pri Esperanto en GDR. La universitato donis por la tuto la maloftan, plej altan predikaton *summa cum laude* (=eminenta). Per tiu disertacio Blanke denove substrekas sian kompleksan, plurkampionan profesion agadon por Esperanto.

Lingvo aŭ dialekto?

ĈU LA FRIULA estas nomenda lingvo aŭ dialekto, jen demando, kiun oni rajtas fari; sed respondi estas kaj malfacile kaj embarase: malfacile, ĉar momento da pripensado montros, ke ĉiu lingvo estas samtempe dialekto (de pli granda grupo), kaj ĉiu dialekto estas ankaŭ lingvo (ĉar oni parolas ĝin); embarase, ĉar dialekto ŝajnas esti io duagrada. Do nomi la friulan "dialekto", kiam ĝi apartenas al tute alia latinida subfamilio ol la itala, kaj posedas plurcentjaran literaturon kaj florantan skolon de verkistoj prozaj kaj poeziaj — tion oni hezitas fari; sed oni hezitas ankaŭ nomi ĝin "lingvo". Kial? Tio portas nin al la kerno de la diferenco. Ni premisu tuj, ke la demando neniel rilatas la "dialekton" kiel taŭgan instrumenton de la homa parolo. Temas efektive pri miskompreno: pro tio, ke dialekto estas ĉiam **de** io, kaj en ĉi tiu kazo la lingvo de la ŝtato, en kiu oni parolas ĝin, estas la itala, oni supozas kaj diras, ke la friula estas dialekto de la itala. Sed tio estas misnomaĵo: la nacia lingvo de Italujo estas tute simple unu el la formoj prenitaj de vulgar-latino en la diversaj regionoj de la duon-insulo, nome la toskana, kiun faktoroj historiaj kaj literaturaj levis al la rango de normo aŭ **koinè** de la tuta lando. La aliaj formoj, kiel la romanjola kaj la napola, ne estas dialektoj de la

toskana, sed, kiel la toskana mem, dialektoj de latino. Ili estas italaj dialektoj nur en la senco, ke oni parolas ilin sur la teritorio de Italujo. Do la baza, subkonscia distingo estas politika, ne lingvistika: "lingvo" signifas la **oficialan** idiomon de nacio. Tiel vera estas ĉi tio, ke ĉiu provo akiri aŭtonomecon por regiona idiomato ŝajnas al la koncerna registaro kvazaŭ rekta atenco al la nacia unueco. La friula poeto, G. della Vallata (1875-1948), kiu difinis "lingvon" kiel tion, "kio utilas tiom al registaroj, kiom al unuopuloj", eĉ akuzis "germanajn filologojn, ke ili nomis "lingvo" la friulan nur por semi malpacon inter Friulo kaj Italujo"!

Kion do fari? Laŭ ĉi tiu kriterio oni ne povus nomi eĉ la kimran "lingvo"; sed ĉiuj tion faras, ĉar troviĝas nenio, **de** kio ĝi povas esti dialekto, kaj, male ol la friula fronte al la itala, la kimra okulfrappe ne apartenas al la sama subfamilio, al kiu la angla. Teknike, la kimra estas dialekto de la kelta, komun-britona subfamilio (kaj do fratino de la bretona kaj la kornvala, kaj kuzino de la gaela), same kiel la friula estas dialekto de la t.n. "ladina" (kaj do fratino de la grizona (romanĉa) kaj la dolomita; v. *PIV* s.v. **romanĉa**, ne tute ekzakte difinita).

Do antaŭ ĉi tiu diversa lingva parenceco, antaŭ la literaturo, pri kiu ĝi rajtas fieri, antaŭ la fakto, ke de 1077 ĝis 1245 la Patriarkujo de Friulo estis unu el la plej grandaj ŝtatoj de Nord-Italujo, kaj ke ĝi daŭre funkciis ĝis 1751, ni ne povas rifuzi al la friula la titolon de **lingvo**.

D.B. Gregor

Impresoj el Japanujo kaj Koreo

POST la 4-taga vizito al Ĉinio (*Esperanto*, junio 1976, p. 106-107), ni vizitis du landojn, en kiuj ekzistas organizita Esperanto-movado, nome Japanujon kaj Koreon (sudan).

Japanujo

Dum la 47-taga privata restado en Japanujo, ni renkontis pli ol 600 esperantistojn en 13 urboj en la 3 plej grandaj insuloj, en formoj de dudeko da kunvenoj (akcepto de Japana Esperanto-Instituto, tutlanda "kunloĝado", 2 regionaj kongresoj, regionaj kaj lokaj bonvenigaj kunsidoj) kaj deko da neformalaj renkontiĝoj. Aperis tri artikoloj pri nia vizito.

En Japanujo kun 110 milionoj da loĝantoj — longa lando, kiu, kompare kun Eŭropo, etendiĝas de la nordo de Danlando ĝis la sudo de Italujo — la cirkonstancoj por la tutlanda Esperanto-movado ne estas simplaj, des pli, ke tiu lando mem estas geografie izolita. Ankaŭ bildigi la tutlandan movadon, kiu estas kompleksa, ne estas tre facile.

Japana Esperanto-Instituto. La kontaktoj inter UEA kaj la japana Esperanto-movado datiĝas jam de antaŭ pli ol 40 jaroj. En la jaro 1936, UEA tie havis ĉefdelegiton kaj delegitojn en pli ol 20 urboj. Japana Esperanto-Instituto (JEI) — jure institucio — fondiĝis en 1920 kaj aliĝis al UEA en 1956. Multaj el la legantoj certe ankoraŭ memoras la komitatanon Hideo Jagi, kiu ekde 1959 estis vicprezidanto, kaj poste, ĝis sia morto (1964), prezidanto de UEA.

La sola tutlanda organizaĵo JEI nun havas 1580 "membrojn" (jure abonantojn de la organo), kaj ĝia 2-etaĝa domo (refarbenda!) troviĝas en bona kvartalo en Tokio kun kelko da salajrataj geoficistoj.

El ĝiaj diversaj agadoj, aparte menciinda estas ĝia akurate aperanta monata revuo *La revuo orienta* (32-paĝa). Ne ekzistas pli ol kelko da landaj organizaĵoj en la mondo, kiuj eldonas tiel ampleksan gazeton ĉiumonatan.

Al ni JEI donis ĝojindan novaĵon, ke ĝi varbis 59 pliajn membrojn por UEA por la nuna jaro, responde al la varba kampanjo.

En eksteraj rilatoj, JEI konstante ĝuas bonan rilaton kun la landa Unesko-Komisiono; pagante jarkotizon al la Unesko-Asocio, JEI ĉiujare ricevas subvencion tra tiu kanalo. Kvankam la sumoj varias de jaro al jaro, ili estas multoblo de la jarkotizo.

Regionaj "ligoj". Tute aparte de JEI troviĝas, en la tuta lando, 7 regionaj "ligoj", kun proksimume 900 membroj. El tiuj ligoj, tiu de la regiono Kansaj (KLEG) elstaras pro sia membraro de 400 personoj kaj dinamisme iel ĉefrolas inter 4 ligoj, kiuj havas komunan monatan organon *La movado*, redaktatan en la oficejo de

KLEG, kie ĉiutage laboras salajrata oficisto. Jam de longe, samkiel kelkaj unuopuloj, KLEG opinias necesa la fondon de strukture demokratia tutlanda asocio ekster JEI. Tamen, pro tiu aŭ alia kialo, ne ĉiuj 7 ligoj ĝis nun konsentis fondi la federacion. Sub ĉiu ligo troviĝas lokaj kluboj kaj individuaj membroj. Principe ĉiu ligo okazigas sian jarkongreson, kies partoprenantaro varias de kvindeko ĝis kelkcento da personoj.

Rondo Harmonia. Estas ne tre facile koncepti, kio estas la konata Rondo Harmonia. Ĝin fondis en la jaro 1966 nur deko da studentoj en Kioto. Ĝiaj dinamismo kaj alia agadlinio, ol la kutima, tiel logis gejunulojn, ĉefe universitatajn studentojn, ke nuntempe Rondo Harmonia havas pli ol 800 membrojn en siaj 50 sekcioj, kiuj dise troviĝas en la suda duono de Japanujo. Ĝi, onidire, naskiĝis el "la stagnado" de la japana Esperanto-movado. Proksimume 90 procentoj de la membraro estas dudekjaruloj, kiuj formas studentajn rondojn en siaj universitatoj. La ceteraj — ne tre eksjunaj — formas "urbanajn" rondojn en la nomo de sekcioj de Rondo Harmonia. Krom eldoni la monatan bultenon *La harmonio* kaj diversajn dokumentojn, ĝi organizas "kunloĝadojn", kursojn, neregule kongresojn kaj fakajn agadojn.

Kvankam la jarkotizo de Rondo Harmonia ne estas malalta (ĉ. 22 gld.), pluraj junegaj el ĝiaj membroj samtempe apartenas al JEI, regiona ligo kaj/aŭ UEA. Rondo Harmonia ne strebas fariĝi tutlanda asocio, sed celas sian prosperadon, eĉ esperante, ke ankaŭ en aliaj landoj fondiĝos sekcioj de Rondo Harmonia aŭ aparta organizaĵo simila al ĝi, precipe en la sfero de universitatoj.

Esperanto-oficejoj. En la tuta lando, por lokaj kluboj aŭ regionaj ligoj estas granda emo akiri propran oficejon, kiu estas nomata "Esperanto-centro" aŭ "Esperanto-domo". Ni vizitis tiajn oficejojn en Sapporo, Tokio, Jokohama, Nagoja, Osaka, Kioto, Takacuki kaj Kumamoto. Ĝenerale tia oficejo konsistas el unu aŭ du ĉambroj kaj kuirejo kaj havas telefonaparaton, stencililon, tajpilon, librostokon kaj, malpli ofte, fotokopilon kaj tranokteblecon.

Kiamaniere oni sukcesas akiri propran oficejon? Kutime, kelkdeko da entuziasmoj fariĝas "subtenantoj" de la oficejo, elspezas ĉiumonate meze po 1 000 enojn (= 9 gld.) kaj ricevas ŝlosilon de la oficejo, kio estas ilia sola privilegio. Mirinde estas, ke multaj el tiuj subtenantoj estas ordinaraĵoj gejunuloj, kiuj ne havas speciale altan enspezon. La monata lupago de tia oficejo varias de 10 000 ĝis 40 000 enoj.

Ĝenerale, tiajn oficejojn la aktivaj membroj povas viziti ĉiutage, iam ajn, ĉu por administri rutinaĵojn, aŭ prepari kurson, aŭ akcepti gastojn, aŭ fari informagadon aŭ simple diskuti tie. Kompare kun la landaj asocioj

en Eŭropo, el kiuj multaj eĉ ne havas propran sidejon, la japana tendenco akiri "centron" certe estas unika fenomeno.

Telefona kaj poŝtokarta servoj. Estis ideo de tokianoj organizi telefonan kaj poŝtokartan informajn servojn. Ekzistas en Tokio telefonnumero, kiu funkcias de vespero ĝis la sekvanta mateno kaj parolas Esperante pri aktualaĵoj en la Esperanto-movado. Ĉiusemajne estas alia novaĵo, surbendigita. Do, komencantoj povas telefone aŭskulti saman novaĵon ripete dum tuta semajno. La prizorgantoj de la telefona servo kaptas ŝancojn por surbendigi, interalie, okaze de vizitoj de alilandanoj aŭ okaze de Universalaj Kongresoj. (Simila servo ekfunkciis en la usona urbo Filadelfio ekde majo ĉi-jare).

La poŝtokarta servo, prizorgata en Tokio, ankaŭ estas unikaĵo. Kiel tiu servo funkcias? Iu ajn loĝanto en Japanujo aĉetas poŝtokartojn, notas sian adreson sur ilin kaj sendas ilin al la poŝtokarta informa servo, kiu resendas po unu poŝtokarton ĉiusemajne surprisinte novaĵon pri Esperanto. Se homo sendas 52 poŝtokartojn al la servo, li/ŝi ricevas ĉiusemajne novaĵon per poŝtokarto dum la tuta jaro. Tiu servo estas senpage farata, samkiel la telefona servo. Ambaŭ servoj bone funkcias.

Korea Respubliko

En Korea Respubliko ni restis dum 5 tagoj en junio. La suda Koreo havas 35 milionojn da loĝantoj, el kiuj 8 milionoj vivas en ĝia ĉefurbo Seŭlo. Dum la mallonga restado, ni veturis norden ĝis la limo kaj suden ĝis Busan kaj renkontis entute naŭdekonojn da esperantistoj en Seŭlo, Degu kaj Busan, okaze de akceptoj, vizitoj al "kunloĝado", kurso kaj aliaj kunvenoj.

Fondiĝo de nova tutlanda asocio. Post la kunfandiĝo, okazinta en la pasintjara aŭgusto, de Korea Esperanto-Instituto (fondita en 1945), Korea Esperanto-Societo (fondita en 1963), Korea Esperanto-Junularo (fondita en 1958) kaj Korea Esperantista Junulara Organizo, la nove naskita Korea Esperanto-Asocio (KEA) estas la sola tutlanda organizo. Ĝi nuntempe havas 250 membrojn.

Laŭ la "Mesaĝo al koreaj esperantistoj" de KEA, datita 1975 08 31, la kaŭzoj de la fondiĝo de la nova KEA estis "senordaj figuroj skismaj en organizaj aferoj dum la lastaj 10 jaroj" kaj "instruo, ke la plej necesaj estas la unika landa organizaĵo kaj la unuigita forto de la aktivuloj". KEA nun klopodas unuecigi disajn fortojn kaj grandparte sukcesis en tio. Ĝi serioze konsideras, ĉu inviti Pacifikan Kongreson al Seŭlo. Tion rakontis kun espero la 30-jara ĝenerala sekretario Gim Ĉilhjen, kiu ofte laboras senpage en la oficejo de KEA, situanta en la mezo de Seŭlo.

Konataj figuroj en la funkciularo. Unu el la karakterizaĵoj de la nova KEA estas, ke ĝi havas funkciulojn, kiuj estas tre konataj personoj en la tuta lando. La prezidanto estas s-ro Ĉoi Doksin, eksministro pri eks-terlandaj aferoj, kiun ni ne povis renkonti pro lia vojaĝo al Usono. Vicprezidanto Ĉe Bongjol estas eksdirektoro de renoma asekurkompanio; alia vicprezidanto Gim Samsu, influhava ekonomikisto. Troviĝas ankoraŭ 2 eksministroj, kiuj lernas Esperanton: t.e. s-roj Ŝin Dosung kaj Gim Ponsul. Dank' al tiuj influhavaj personoj, KEA nun havas bonajn rilatojn kun tutlandaj televido, radio kaj ĵurnaloj, kiuj kelkfoje raportas pri Esperanto kaj kiuj ankaŭ nin intervjuis.

Intensa instruado. Floras kursoj. Ili okazas tre ofte almenaŭ en diversaj lokoj de Seŭlo. Gvidas s-roj So Gilsu, Gim Ĉilhjen, Gim Taekeng, Kim K. Paŭlo; la lastaj du vivtenas sin preskaŭ nur per instruado de Esperanto.

Dum nia restado hazarde okazis "kunloĝado" de 37 gejunuloj en infanvartejo (!), apartenanta al s-ro Ĉe Bongjol, kaj ni ĝuis renkonti la gajajn partoprenantojn. Alia aspekto de kursoj, kompare kun aliaj landoj, estas intenseco de la instruado, precipe kursoj gvidataj de s-roj So Gilsu kaj Gim Ĉilhjen. Kelkaj el la supremenciitaj sociaj gravuloj lernas Esperanton ĉiumatene frue. Ofte la kursanoj sekvas 15 aŭ 20 lecionojn en sinsekvaj labortagoj.

Bedaŭrinde nun mankas vortaroj. Korea Esperanta vortaro neniam aperis kaj Esperanta-korea vortaro elĉerpiĝis. Ekzistas kelko da lernolibroj, el kiuj unu (de



Unu el la eventoj, kiujn en Japanujo kaj Koreo partoprenis ges-roj Woessink (ili staras supre de la flaga stelo): La 24a Kongreso de Esperantistoj en Kansajo, en Kioto, la 29an kaj la 30an de majo 1976, kun 353 aliĝintoj.

s-ro So Gilsu) estis ĵus represita. Aperontaj estas pliaj lernolibroj.

Sociaj cirkonstancoj. La esperantistoj en la lando ne povas libere sendi monon eksterlanden, nek eliri sian landon sen invitilo. Tio malhelpas, ke ili aĉetu librojn el aliaj landoj kaj ke multaj el ili venu al Universalaj Kongresoj, diference de la kazo de japanoj.

Ĉiujare, lastatempe, vizitas la sudan Koreon deko da ne-koreaj esperantistoj, kio ne sufiĉas por la esperantistoj tie, kiuj arde sopiras al kontaktoj kun aliaj landoj. La nova KEA havas preskaŭ neniom da materiaj rimedoj nuntempe. Helpopretaj legantoj uzu jenan adreson: KEA, C.P.O. Kesto 4258, Seŭlo 100, Korea Respubliko.

Ekde la ĉi-jara julio, laŭ dekreto de la registaro, oni ne plu rajtas uzi fremdajn vortojn en la reklamtabuloj de la butikoj. Tio povus montriĝi pozitiva ankaŭ por la Esperanto-movado.

E.J. Woessink
A. Woessink-Nagata

Lerneja Bulteno

**Redaktas: Germain Pirlot, Kemmelbergstr.
5/b.3, B-8400 Oostende, Belgio.**

"JUNA AMIKO" — revuo por geinfanoj

Estas dezirinde, ke ĉiuj instruistoj kaj kursgvidantoj, kiuj ĝis nun estas apenaŭ informitaj pri la revuo, konatiĝu kun la aperintaj numeroj de *Juna amiko*, cele al diskonigo kaj abonigo de tiu revuo. Ni nepre subtenu tiun internacian lernejan revuon, konvinku instruistojn kaj aktivulojn akiri laŭeble multajn abonantojn inter lernejoj kaj komencantoj, poste instigu ilin partopreni en aktivecoj organizitaj por ili pere de la revuo. *Juna amiko*, kvarmonata, 5,70 gld.

Informoj: Eld. Hungara Eo-Asocio, Pf. 193, H-1368 Budapeŝto. Red. s-ro Géza Kurucz, Hitel u.10. fszt.16, H-6000 Kecskemét, Hungario.

Pri la projekto "Aloha"

Ne temas pri programo por instrui Esperanton, sed pri instruado de la angla lingvo kaj ties literaturo. La tuta programo daŭras de la t.n. "infanĝardeno" ĝis la sesjaro de elementa instruado. Esperanto eniras la programon nur en la lasta jaro, dum tri-kvar semajnoj, kiel parto de la studunuoj "internaciaj lingvoj", kies ĝenerala celo estas montri kia estas la homa komunikado.

La programo ekis fine de 1968 sed, dum 1975, ĝi komencis penetri la kontinentan parton de Usono, en kelkaj lernejoj de Kalifornio kaj Vaŝingtonio.

Laŭ leteroj de du instruistoj en Havajio, kiuj ne estas esperantistoj, ili estis komence skeptikaj pri la utilo

instrui Esperanton al infanoj, kiuj ankoraŭ havas problemojn ĉe la angla, sed ili trovis poste, ke ĝi estas inter la plej popularaj eroj de la programo. Unu menciis la utilon de Esperanto kiel komparilo ĉe klarigo de la strukturo de la angla kaj, ke la studo de Esperanto sufiĉe larĝigis la pensmanieron de la infanoj, tiel ke ili ne plu tiom emis priridi homon, kiu parolas la anglan iom alimaniere ol ili.

Informis: ELNA, P.O. Box 508, Burlingame CA 94010, Usono; (angle): HEP / Project Aloha, Berryessa Union School District, 935 Piedmont Road, San Jose CA 95132, Usono.

Paderborna eksperimento

Meze de julio 1976, finiĝis por 40 elementlernejoj el Paderborn (FR Germanio) la 18-monata lingvoorientiĝa instruado, kiu okazis en Esperanto. Ekde februaro 1975, ili havis po 2 instruhorojn semajne. Nun, tiuj gelernantoj vizitos duagradajn lernejojn, kaj estos interese observi, kiel tiu grupo sukcesos en la diversaj klasoj de la angla kaj latina.

Ankaŭ en Le Mans (Francio) finiĝis Esperanto-kurso, gvidita de S-ro J. Bénistant. Kaj en Paderborn kaj en Le Mans, parto de la instruado okazis per la instru-aŭtomato Robbimat-2.

Informis: Eŭropa Klubo, Riemekestr. 62, D-4790 Paderborn, FR Germanio.

Leĝoj pri Esperanto en Brazilo

Laŭ informoj senditaj de prof. E. Fontes, el San-Paŭlo, ni ekscias, ke en Minas Gerais (oriento de Brazilo), leĝo n-ro 505/76, de la 4a de junio, kreis devigan kurson ĉe la Beletra Fakultato de la Federacia Universitato en la urbo Juiz de Fora. Eble la kurso komenciĝis en aŭgusto. Laŭ tiu leĝo, Esperanto havas la samajn rajtojn kiel la franca kaj la angla.

Aliflanke, se la leĝpropono n-ro 1298, prezentita pasintan oktobron, estos aprobita, baldaŭ la Internacia Lingvo estos enkondukita en multajn brazilajn duagradajn lernejojn.

Informis: prof. E. Fontes, Caixa Postal 5888, São Paulo, Brazilo.

En duagradaj lernejoj de Madagaskaro

Komence de februaro 1976, la Malagasa Esperanto-Instituto ricevis cirkuleron de la direktoro de la duagrada instruado de la Ministerio pri nacia edukado de Malagasa Demokratia Respubliko, sub n-ro 76/02254/DES.2/AS de 1976 01 30, per kiu li oficiale sciigis al ĉiuj lernejestroj de publikaj kaj privataj duagradaj lernejoj de Madagaskaro pri la permeso starigi ne-devigan instruadon de Esperanto dum 1976. Tiu instruado, kvankam oficiala, estas nur eksperimento, kaj necesas, ke ĝi donu pozitivan rezulton, por ke ĝi estu poste konsiderata kiel deviga lernobjekto.

Informis: s-ro Eugène Raveloson, B.P. 127, Tananarive, Malagasa Demokratia Respubliko.

Roterdamo aŭ Bruselo?

En la maja n-ro de *Esperanto* (p.85) leviĝas demando pri translokiĝo de la sidejo el Rotterdam. La unua alineo de tiu artikolo donas respondon, kaj ankaŭ la klopodoj de la Estraro dum la pasintaj du jaroj establi ian ekvilibron en la financaj aferoj de la Asocio. Venas kiel ŝoko eĉ, ke oni pensas pri forĵeto de tiuj du rilataj eroj. Kaj, por gajni kion? Ĉu por sekvi la oficulojn de EEK? Oni povas listigi multajn eŭropajn urbojn, kiuj estas gravaj en la nuna momento. Post kelkaj jaroj aliaj lokoj elstaros. Oni ne povas translokiĝadi laŭ la politikaj ventoj.


H.J. Clayton, Britio

La elekto de Bruselo — sidejo de NATO — ne estas tute konvena por kelkaj landoj, kiuj nuntempe esence helpas la Movadon. Sammaniere oni povus proponi Varsovion, la lulilon de la Internacia Lingvo. Mi opinias, ke multaj malfacilaĵoj estus solveblaj en Vieno, kie kreskas ankaŭ bela UN-centro.

K. Nagy, Hungario

Bruselo vere estus pli taŭga sidejo, ol Rotterdam, se UEA ne jam havus propran oficejan domon. Ĉar translokiĝo estus multekosta, CO de UEA prefere restu kie ĝi estas.

W.A. Verloren van Themaat, Nederlando



Por kaj kontraŭ eventuala translokiĝo el Roterdamo: La ĝardena flanko de la nuna Centra Oficejo de UEA.

Mi ege subtenas la proponon, ĉar Bruselo estas multe pli centra urbo. Vi translokiĝu!

C. Beckford, Sud-Afriko

Bruselo fakte prezentus unikajn avantaĝojn kiel centro de UEA. Tamen, vi ne forgesu esplori ankaŭ eblecojn translokiĝi al unu el la du aliaj eŭropaj urboj, t.e. Strasburgo kaj Luksemburgo.

A. Wickler, Luksemburgo

Bona ideo kaj interesaj argumentoj de la prezidanto, s-ro Tonkin.

S. Smigielski, Pollando

La CO nepre ne transiru al Bruselo, la ĉefurbo de la Eŭropa Komunumaro de naŭ landoj. UEA restu neŭtrala inter ili kaj la ceteraj eŭropaj kaj ekstereŭropaj landoj. Roterdamo kaj Antverpeno taŭgas ĝuste ĉar ili ne estas centroj de apartaj politikaj grupiĝoj; Ĝenevo kaj eventuale Vieno taŭgas, ĉar ili estas ĉie agnoskataj kiel neŭtralaj forumoj.

P.A. Danning, Britio

Certe estas utile, se UEA translokiĝos al Bruselo. Kred-eble, oni decidis lupreni aŭ aĉeti etaĝon en iu domo. Sed propra domo, kia estas la nuna en Rotterdam, estas hejmo por Esperanto kaj UEA, kaj posedas enorman sentvaloron por la esperantistaro. Iu etaĝo estus nepersona, komerca, seka afero.

Esp. Rondo Crailsheim, FR Germanio

Redakcia noto: Ĉi tie aperas nur fragmentoj de parto de la ricevitaĵoj reagoj pri eventuala translokiĝo de la CO de UEA. Laŭ esploroj de la Komisiono pri financo kaj administrado, oni ankoraŭ estas tre malproksime de decidaj paŝoj al translokiĝo, i.a. pro la fakto, ke simila domo en Bruselo kostus konsiderinde pli ol la nuna sidejo en Roterdamo. Do, ne necesas tro emociiĝi pro la fakto, ke oni nur interesiĝas pri eventuala translokiĝo.

Ne responsa, sed respondeca

”Responsa” estas unu el la multnombraj malnecesaj neologismoj, troviĝantaj en *Plena Ilustrita Vortaro*. Anstataŭ tiu superflua vorto ekzistas Zamenhofa ”respondeca”. Jen kelkaj ekzemploj: ”demeti de unuj ĉiun respondecon por la agoj de aliaj (Zamenhof), ”patrino respondecas por edukado de sia infano”, ”li respondis vian leteron kaj respondecas por ĝia enhavo”.

Mag. Isaj Dratwer, Israelo

Kiel germana ”zwo”

Multaj personoj ne povas klare prononci la numerojn ses kaj sep kaj ofte okazas miskompreno. Do, mi proponas anstataŭe uzi **sejs** por ses por eviti miskomprenon ekz. en telefonkonversacio, en la operacio de komputilo ktp. Tion faras ankaŭ germanoj kiam ili parolas telefone, anstataŭigante la aŭtentikan numeron *zwei* per *zwo* pro la timo ke *zwei* (du) ofte simlasonas al *drei* (tri).

Bebson Takata, Japanio

JUBILEA SEMINARIO DE GEJ:


Dudekan fojon

KONSIDERANTE la iom-post-ioman maturiĝon de rektaj elektoj por la Eŭropa parlamento, la temo de la 20a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo "Demandoj pri Eŭropa Unuiĝo" ŝajnas esti trafe elektita. Por taŭge festi la jubileon de la jam renomaj seminarioj, oni trovis aparte modernan junularan domon, kiu havas bele ekipitajn 3-litajn ĉambrojn, kaj situas meze de arbaro, 15km oriente de Kassel. Gvidas la programon nova organiza teamo, kiu konceptas laborgrupojn kaj prelegojn pri la ĉeftemo, kaj eventuale lingvokursojn por komencantoj. La distra flanko de la programo riĉiĝos per i.a. ekskursoj, promenoj, magia vespero kaj silvestra balo. Okazos ankaŭ diservo kaj programo pri la 25-jara historio de GEJ. Eblecoj por naĝado kaj saŭnado ekzistas; funkcios ankaŭ dum-eventa fotoservo kaj eksperimentado per aŭdvida surbendigo/filmado. La aliĝkosto estas GM 90 (ĝis inkl. 25 jaroj) kaj GM 110 (pli ol 25 jaroj), kun krompago de GM 10 por pago post la 1-a de decembro 1976. Akceptas aliĝojn Hans-Dieter Platz, Maikammerer Strasse 21, D-6731 St. Martin. Oni ĝiru antaŭpagon de GM 10 al poŝtĉekkonto: Karlsruhe 131690-754 por GEJ, 6731 St. Martin. La seminario okazos inter la 27a de decembro 1976 kaj la 3a de januaro 1977, ĉe Jugendburg Sensenstein, D-3501 Nieste, FR Germanio.

Antipoda reviviĝo

MALMULTON oni aŭdas pri la junulara Esperantomovado en Aŭstralio dum la lastaj jaroj, kvankam ĝi daŭre aperas en la listoj de la landaj sekcioj de TEJO. Lastatempa novaĵo, tamen, signalas pli intensan junularan agadon en tiu vasta lando. Temas pri okazigo de tendaro por junaj esperantistoj, apud Launceston, en Tasmanio, la unua tia aranĝo en la lando. La datoj de la tendaro — 28a de decembro 1977 ĝis la 1-a de januaro 1978 — ebligas postan partoprenon en la 21a Aŭstralia Kongreso en Launceston. La organizantoj de la tendaro esperas bonvenigi vizitantojn el eksterlando. La antaŭpago estas Aŭs\$10 aŭ ekvivalento kaj la tuta pago Aŭs\$25. Informoj: Junulara Esperanto-Tendaro, P.O. Box 638, Launceston, Tasmanio 7250, Aŭstralio.

FOTOMOZAIKO: Ni delonge frontas problemojn kompilante la ĉi-paĝan rubrikon en la revuo. Plej ofte mankas informoj. Sed, ne mankis fotoj, almenaŭ ĉi tiun fojon. Ni ne scias, kion TEJO faras, sed ĝi ja abunde pozas. Incito? Jes, tion ni efektive celis!



Fidela sence kaj sone

Recenzas D. B. Gregor (Britio):

Doloro, La, de Giuseppe Ungaretti (1888-1970). El la itala tradukis N. Rossi. Pisa: La Nuova Frontiera, 1975. 62p. 21cm.

Ungaretti publikigis ĉi tiun poemkolekton en 1947 post la morto de siaj frato kaj 9-jara filo; do li tuŝas kordon, kiu vibras en ni ĉiuj. La problemo por N. Rossi estis, ekkapti la foje "hermetikan" sencon de la frazoj, kaj redoni ĝin sen perdo de la muziko de la italaj vortoj. Li brile sukcesis. Oni rajtas dubi, ĉu traduko en alian lingvon povus tiel fidele reprodukti sencon kaj sonon.

Tion mi diras rigore komparinte tradukon kaj originalon, kiam mi konstatis denove (v. *Esp.* 1970/155), ke Esperanto mirinde kapablas preskaŭ laŭvorte redoni italan poezian tekston — kun plena reteno de klareco kaj poezieco — kondiĉe kompreneble, ke ĝin uzu poeto. Bona ekzemplo estas n-ro 11 sur p. 23 (teksto en eld. Penguin, p. 380); kaj ekzamenante "Ne plu ekkriu" el ĉi tiu vidpunkto, oni trovas 15 son-koincidojn de la du lingvoj en 8 versoj kaj 24 vortoj, dum ties angla traduko liveras nur 5; kaj, se franca traduko liveras 18, tiu malgranda plimulto ekzakte spegulas la pozicion de Esperanto kiel latinida lingvo kun pli forta dozo da ĝermanaj vortoj ol la franca.

Parton de sia sukceso Rossi ŝuldas al lerta uzo de kunmetaĵoj, kiel **ĉiublove** (*ad ogni soffio*, p.23), **fulmoage** (42), **tedoludaj** (*accidiose*, 55) (sed **sinforgeselan'** estas tro longa), parton al plena eluzo de la Esperanta vortfarado; ekz. **ĉiesa Dio** (*Dio di tutti*, 50), **Descendu estre ... mezen de ...** (53), **repovu** (*ripotrebbe*, 58). Unufoje li lasas sin misgvidi de sia itala, nome ĉe **penis** (21, pro *penare*, "suferi"), kaj dufoje mi volus, ke li ne apartigu de ĝi ellasante la difinan artikolon (17, antaŭ **vivo** kaj 30/5 antaŭ **knabo**), kiun la senco bezonas. Plue, en la unua strofo sur p.18 la vortordo estas tordita preskaŭ latinece aŭ kiel ĉe la *Odoj barbaraj* de Carducci; sed, tio estas izolita peko. Kelkaj demandoj sin trudas: Kio regas "ilin" sur p. 35/2? Ĉu, aŭdace, "blindige"? (Kp. "enire San Clemente-n", 45). Ĉu "Ĝis kiam" anstataŭ "Kiam" (*quando*) sur p.22/-1 ne riskas ŝanĝi la sencon, ĉar la poeto pensas pri la **momento** de la morto? Kial "restigi" por *posare* (33, n-ro 2), kaj ĉu "jam" tie estas preseraro por "iam" (*mai*)? Ĉu "dissolvas" (43/5 **dis-**

Nova trajto de la originala beletro en Esperanto: Ges-roj Beaucaire en konversacio kun d-ro V. Sadler (meze), dum la 61a UK en Ateno ĉi-jare.

solvi) ne devus esti imperativa, kiel la sekvanta "levu" (*sommuovi*)? Ĉe 50/4, ĉu elfalis "ne" antaŭ "ĝin retrovos" (*non la ritrovi*)? Ĉio ĉi estas nur detaloj, menciendaj tamen, kiel ankaŭ la ĉeesto de la du vortoj ankoraŭ ne enhejmiĝintaj, sed sankciitaj de *PIV*, **mava** (angle: "impious", 34, kaj 46) kaj **pokaj** (44).

Do nun, kiel atentigas C. Minnaja en sia interesa enkonduko, la tuta verkaro de Ungaretti estas tradukita en Esperanton. S-ro Rossi povas esti trankvila: li ja "trafis la celon".

Prezo: 8,10 (por Nederlando 8,42) gld. plus sendokostoj 10%.

Ĝi pitoreske animas la lingvon

Recenzas Tacuo Huĝimoto (Japanio):

El la vivo de bervalo sentaŭgulo, de Louis Beaucaire. La Laguna: J. Régulo, 1974. 134p. 18cm. Broŝ.

Se mi legus ĝin antaŭ dudek jaroj, aŭ se mi nun estus dudekjara, tiam mia reago al tiu ĉi **maldeceta epizodaro** estus multe pli vigla.

Anekdoto povas esti pli drola ol epizodo. Se jes, mi trovas nur natura tion, ke min malpli tuŝe amuzis tiu ĉi epizodaro, ol la unua verko de la sama aŭtoro: *Kruko kaj...*, kies subtitolo tekstis jene: **maldecaj anekdotoj por neprudaj legantoj**. Dum *Kruko kaj Baniko* estis rekte el Bervalo, tial universale simpatiaj, tiu ĉi Luĉjo estas bervalo sentaŭgulo kaj ankaŭ bona esperantisto. Laŭ la unua epizodo el entute dek du, la vorto **esperanti** sonis al la oreloj de Luĉjo kiel **amori**. Fidela al sia juneco, en kiu li sukcesis kombini ambaŭ feliĉajn aferojn, li fosas eterne sian sulkon. Siatempe konataj ĝisostuloj ne povas egali lin tiukampe, ĉar



krom la prudento bazita sur la klasika *Fundamento de Esperanto*, kiel tion forte atestas trafaj frazoj el la *Ekzercaro* mote aŭgurantaj tra la tuta epizodaro, lian esperantismen subtenas ankaŭ precipa scipovo de lia bona patro, L. Beaucaire, kiu evidente trastudis: *Plena Ilustrita Vortaro*. Almenaŭ mi mem konsultis ĝin plurfoje, kiam temis pri vortoj por mi ekzotikaj. Kvankam piednotoj ofte estas spritaj, tamen kelke da fremdaj frazoj en la teksto restas nur enigmo por mi, simpla malpoligloto. Mi ne povas kompreni ĉiujn nuancojn en la maldeceta epizodaro, kiam temas pri kredeble franckulture signifoplenaj detaloj. Feliĉe, tamen, abundas esperantiste kaj home ĝueblaj ŝercoj kaj spritaĵoj.

En la originala literaturo de Esperanto aperas de tempo al tempo tiaj unuavide nur kuriozaj verkoj, kiel tiu ĉi libro, kiuj tamen estas fakte tre seriozaj.

Se matureco signifas ankaŭ kapablon priridi sin mem, jen spegulo por ni esperantistoj, kvankam oni ne bezonas doni al ĝi aprobon, nek kondamnon kaj sufiĉus, se ni scias mem rideti aŭ grimaci antaŭ la bildoj.

Konklude: Pro partikularismo de mi kiel esperantisto mi tute malrekomendas ĝin traduki nacilingven, kaj mi ĵaluze ĝuadas ĝin sole en ĝia Esperante originala vesto aŭ nudo, ĉar por tio la aŭtoro pitoreske animis la zamenhofan lingvon.

Prezo: 10,50 (por Nederlando 10,92) gld. plus sendokostoj 10%.

Por unua lego

Recenzas Probal Daŝgupto (Hinda Unio):

Bhagavad-Gītā, t.e. sublima kanto pri la senmorteco, epizodo el la antikva sanskrita eposo *Mahābhārata*. El la sanskrito tradukis F.V. Lorenz. Rio de Janeiro: Federação Espírita Brasileira, 1975 (2a eldono). 95p. 18cm.

‘Aŭtentika’ ekzistinto (multaj opinias) liberelekte difinas artekoheran trajektorion, trovante — kontraŭ aliulaj antaŭjuĝoj, anstataŭdecidoj — solvojn por problemoj personaj. Tia ideado rolas pravige por diversspecaj hegemonioj. Nehegemoniaj kulturgrupoj havas taskon, rezisti tiujn legitimilojn kaj klare esprimi — principe, age, individue, naciope — malpli bizarajn aŭtentomanierojn.

Dum la hindlanda aŭtonomiĝo-strebado, unuj niaj gviduloj konstruis kodon socipraktikan sursokle de la praetiko, kiun *La Eternulkanto* resumas, dum aliaj opiniis niajn arton, amon, tonriĉon nepre bezonaj en vivipova re-interpreto de tiu moralo. La fundamentajn lecionojn ĉiuj konsentis. Devoj antaŭestas rajtojn. Agoj estu sakramentaj, ne pagekspektaj. Absurdas provoj taksi/‘plibonigi’ ies konduton abstrakte disde liaj **klaso** kaj **antaŭaj naskiĝoj** — personaj, ĉirkaŭulaj pasintecoj — kiuj determinas vojojn ‘liajn’. Unuopuloj, funkciante en asimetria interagistemoj pli retaj ol

perceptebla, spertas/agas pli komplekse ol en sia opinio, celu do regi la principan klarĉielecon de vivado, ne ĝian enhavon. — Montros estonta praktiko, kiom tia interpreto efikas.

Perspektivo okcidenta. — Ekologoj, strukturalistoj, povas legi la **renaskiĝo**-ideon ‘metaforo’ pri paso tra stadioj maltre intersentaj; la **spirito, energio, materio** povas simili al transformoj, paradigmatis, sintagmoj (Michel Foucault); sed pli emfazendas la diverĝo: NE pri butikuma pluralismo/diakronia relativismo de veroj temas, sed pri neeblo unike algoritmi, en konkreto konstata kaj realiga, ĉies personan specifecon.

La traduko, flueversa, estas akceptebla por unua lego de *La Eternulkanto*. Dubaj interpretoj ne mankas, nek sencoŝanĝaj trokoncizigoj — tute nemalagrange en traduko de azia poemo, kvankam rezultas reduktado de religia fidindo kaj, foje, de etosa. Sed: “Kiel akvo el putego servas por diversaj uzoj, multuze la Sanktaj Libroj servas al student’ prudenta” (2:46).

Respektindaj hindaj precedencoj ekzistas.

Prezo: 9,30 (por Nederlando 9,67) gld. plus sendokostoj 10%.



Akvariinfanoj, La, W.A. Verloren van Themaat. Lelystad: Vulpo-libroj, 1976. 64p. Ilus. 20cm. ISBN 90 70074 06 0. Originala romano traktanta libervolan abortigon en la proksima estonto. **Prezo:** 9,60 gld.

Etnaj problemoj en sudorienta Eŭropo, R. Grulich. Stolberg: Etnismo, 1976. 12p. Mimeo. 30cm. **Prezo:** 1,80 gld.

Elektitaj verkoj de Maŭ Zedong, Vol. IV. Pekino: Guozi Shudian, 1976. 438p. 22cm. Bind. Verkoj 1945-1949. **Prezo:** 9,— gld.

Eseo pri Ido, Tazio Carlevaro. La Chaux-de-Fonds: Kultura Centro Esperantista, 1976. 49p. Mimeo. 21cm. Priskribo, precipe lingvistika, de la planlingvo. **Prezo:** 8,10 gld.

Esperanta-kamboĝa vortaro, C. Sok Bun kaj H. Sreang Hean. Rotterdam: UEA, 1976. 148p. 20cm. **Prezo:** 19,80 gld.

Esperanto, internacia lingvo de amikeco (1972). Roxboro: Kanada Esperanto-Asocio, 1976. 121p. 17cm. Reeldono tri-lingva (angla-franca-Esperanto, kun loko por aldoni plian lingvon) de la olimpika sporta terminaro de R. L. Harry. **Prezo:** 6,— gld.

Espéranto vivant, L' (1964), P. Delaire. Orléans: Centre National Espéranto-Office, 1976. 128p. Ilus. 16cm. Kompleta 12-leciona kurso, kun tekstoj, ekzercoj, gramatikaĵoj kaj vortlistoj. **Prezo:** 13,20 gld.

Facetoj de Esperanto, W. Auld. Londono: Brita Esperanto Asocio, 1976. 51p. 20cm. Eseo pri poezia lingvaĵo en Esperanto, kompara literaturo kaj transskribo de propraj nomoj; versa letero al W. Harmon. **Prezo:** 4,80 gld.

Fianarana Esperanto, F. Rasoanaivo. Eldono de la aŭtoro, 1975. 64p. 21cm. 10-leciona lernolibro kun ampleksaj gramatikaj klarigoj, ekzercoj kaj vortolistoj. **Prezo:** 6,— gld.

Filigrajoj el lumo, Divaldo P. Franco. El la portugala trad. B. Silva. Rio de Janeiro: Federação Espirita Brasileira, 1976. 154p. 18cm. Mediuma poemaro “diktita de R. Tagore”. **Prezo:** 11,10 gld.

Forkaptita (1886), R.L. Stevenson (1850-1894). El la angla trad. A. Goodheir. Glasgow: Eldonejo Kardo, 1976. 181p. 21cm. ISBN 0 905149 01 7. Elstara aventurromano pri Skotlando en la 18a jarcento. **Prezo:** 13,80 gld.

Printempaj strofoj

Arbarkvieto — sen spuro de pasantoj frostas vojeto, ŝutiĝis sur deklivo neĝfalo de galantoj.	Jam verdiĝinte lariko celas sagon ĉielen pinte sed indikas terkoron spegulite en lagon.
Pelas degelo ŝaŭmon el la montalto, svingas avelo oron kie torento glaŭkas super bazalto.	Ĉiel' aŭroras; malantaŭ urbtrafiko la montoj gloras. Ekkantas en arb-ombro la merlo, homamiko.
Sunenergio terkapta en eksplodo, momentvizio de homa matureco — l'unua leontodo.	Maja ĝardeno — sub frua turdokanto lum' de mateno rompiĝas ĉielarke en roso sur lekanto.

Ni supreniris
pli alten ol alaŭdo.
Nubaron ŝiris
la vento; el la valo
aŭdeblas akvoplaŭdo.

Trempas folion
plorsaliko; ĉu lasas
tempfluo ion?
Mevoj super rivero,
funden folioj pasas.

Falĉas traktoro
gazonon en la parko.
La herbodoro
revokas fojnfaradon
sur apudmara kampo.

En nia nordo
ne kantas najtingalo,
sed ĉe la bordo
de nokta pinarbaro
susuras la sekalo.

Trans estuaro
arko de ponto ŝtale
kontraŭ nubaro
sincere, senorname
glorkantas katedrale.

Se via kruro
restas sub skribotablo,
literaturo
estas forĝi la venton,
tordi ŝnuron el sablo.

Torenton maro
akceptas, historion
la ĉiamaro.
La bona heredanto
fine rikoltas ĉion.

Albert
GOODHEIR

Gengogaku to kokusaigo (1932), E. Spiridoviĉ (1891 - ?). Trad. Oosima Yosio kaj Yamazaki Huzio. Kioto: l'omnibuso, 1976. 182 + 4p. 18cm. Fotorepreso de japana traduko de la ruslingva verko *Lingvoscienco kaj lingvo internacia* (1931). Prezo: 1000 enoj.

Gluafiŝeto "Esperanto parolata" 10 x 4cm., kun blua kaj ruĝa preso sur blanka fono. Prezo de 10 ekzempleroj: 1,80 gld.

Gluafiŝeto ovala, kun la verda stelo kaj la vorto "Esperanto". 12 x 8cm. Prezo por 10 ekz. (minimuma mendo): 10,80 gld.

Grand dictionnaire Esperanto-Français (1955), G. Waringhien. Paris: SAT-Amikaro, 1976. 367 + 16p. 19cm. Bind. Nova eldono kun suplemento de la verko kiu malfermis la vojon al *Plena Ilustrita Vortaro*. Prezo: 28,80 gld.

Homa animo, Despina Patrinu. Ateno: la aŭtorino, 1976. 63p. Ilus. 21cm. Sep rakontoj de la nuntempa greka aŭtorino, kiu en sia gepatra lingvo jam publikigis du romanojn kaj unu novelaron. Prezo: 7,20 gld.

Honore al ili, Memorlibro pri falintaj esperantistoj 1941-1945. Redaktis aparta komitato. Zagreb: Kroatia Esperanto-Ligo, 1976. 111 + 16p. Ilus. 20cm. Prezo: 18,— gld.

Instruplaniga raciigo de la lingvo-instruado. Paderborn: Institut für Kybernetische Pädagogik, 1975. 100p. Mimeo. 29cm. Esploroj kaj eseoj pri problemoj de planita pedagogio. Prezo: 6,60 gld.

Konversacia kurso, H. D. Hartig. Germana Esperanta Fervojista Asocio, 1976. 46p. Mimeo. 21cm. Esperantlingva adapto de moderna anglalingva lernilo, kun aparta emfazo pri la parola lingvo. Prezo: 8,10 gld.

Krutajo "Fluganta aglo", kompilita de grupo da aŭtoroj. Pekino: Fremdlingva Eldonejo, 1975. ĉ 160p. (ne numerita), 17cm. Bildrakonto el la nuntempa Ĉinio. Prezo: 1,80 gld.

Leviĝis nokte hela sun' ..., Trad. H. Kindler. Luksemburga Esperanto-Asocio, 1976. 45t/m. 18cm. Duflanka, stereofona. Kantas Béby Kohl. Religiaj kantoj. Prezo: 10,20 gld.

Metodologio de lingvoinstruado kaj parolalproprigo, I. Szerdahelyi. Budapest: Tankönyvkiadó, 1975. 377p. Ilus. 24cm. Lernolibro verkita por la fako "Esperanto — lingvo kaj literaturo" en la Filologiscienca fakultato de la Universitato Eötvös Loránd en Budapeŝto. Prezo: 14,52 gld.

Media malboniĝo en la mondo kaj rimedoj de civitanoj, Tokio: Meguro Esperanto-societo, 1975. Ilus. 51p. 26cm. Ofsetita tajpaĵo. Raporto pri esplorenketo farita de la eldoninto. Dulingva eldono (Esperanto kaj la japana). Prezo: 5,30 gld.

Natan Ben-Cion Ĥavkin (Ekzemplo de homa vivo), J. Kohen-Cedek. Tel-Avivo: Esperanto Ligo en Israelo, 1976. 16p. 24cm. Prezo: 1,56 gld.

Proverbaro (1910, 1961), Zamenhof k.a. Tesaloniko: Tamtama Eldonejo, 1976. 142p. 17cm. Riĉa kolekto de proverboj, ordigitaj laŭ la nombro de silaboj kaj metrikaj piedoj. Prezo: 7,50 gld.

Spegulo de Esperantaj stiloj, R. Rossetti. Lelystad (NL): Vulpo-Libro, 1976. 16p. 21cm. Serio de 16 artikoloj, pli frue aperintaj en *Heroldo de Esperanto*. Prezo: 1,80 gld.

Tallinn, Red. A. Mesiköpp. Tallinn: Eesti Raamat, 1975. 88p. Kolorilus. 20cm. Bind. Bildlibro pri la estona ĉefurbo; klarigoj en 6 lingvoj. Prezo: 3,90 gld.

Vage tra la dimensioj, Konisi Gaku. Oosaka: Japana Esperanta Librokooperativo, 1976. 77p. 18cm. Sep originalaj sciencfikciaj rakontoj. Prezo: 9,30 gld.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas la minimuman mendosumon de 15,— guldenoj. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas minimume 3,— gld.

En la apuda kolumno de la paĝo 190, vi legas du bibliografiajn liniojn pri "Esperanta-kamboĝa vortaro", pionira verko de C. Sok Bun (maldekstre) kaj H. Sreang



Hean. La aŭtoroj studis teknikon kaj Esperanton en Budapeŝto, sukcese: ili inĝenierigis kaj ilia vortaro aperis.

Kion estonte?

LA TRIA SESIO de Someraj Universitataj Kursoj (SUK) okazis de la 8a ĝis la 29a de aŭgusto. Ĝi disvolviĝis en la moderna kvartalo de la Universitato de Antverpeno, inter la kutimaj aktivaĵoj de la somera universitata vivo.

La programo de tiu ĉi sesio enhavis, kiel tiu de 1974, tri studdirektojn: estis denove bilogio, sed por la unua fojo aldoniĝis matematiko kaj sociologio. Sume, estis prezentitaj 15 kursoj de po minimume 8 lekcionoj 45-minutaj, fare de 7 universitataj instruistoj el Norvegio, Usono, Britio, Belgio, Hungario kaj Pollando. La lekcionoj okazis ĉefe matene, dum la posttagmezoj estis dediĉitaj al studvizitoj, zoologiaj observoj kaj sciencaj filmoj. La partoprenantoj havis tiel la eblecon viziti kalkulcentron, hospitalon, zoologian ĝardenon, naturrezervejon, laboratorion de citogenetiko, komputilfirmon kaj la Ekonomian kaj Socian Komitaton de la Eŭropa Komunumaro en Bruselo.

Necesas aparte emfazi, ke la matematikistoj tre diligente laboris dum pluraj ekstraj kunsidoj, por diskuti terminologiajn problemojn en Esperanto. En la kadro de la sociologiaj kursoj okazis seminario dum kiu oni multe cerbumis pri la organizo de SUK. Krome, dum

la tri semajnoj, sed ekster la vera studprogramo, estis organizita perfektiga Esperanto-kurso.

Ankaŭ dum ĉi tiu sesio, la partoprenantoj estis akceptitaj de lokaj instancoj, akademiaj kaj politikaj: la sesio malfermiĝis en la ĉeesto de reprezentanto de la belga ministro pri nederlandlingva kulturo, oficialuloj de la universitato kaj de la komunuma konsilantaro de Antverpeno; poste, la provinca deputitaro oficiale akceptis la SUK-anojn. Diversaj nederlandlingvaj gazetoj kaj revuoj plurfoje raportis pri la sesio. Tre ampleksa kromprogramo, starigita kun helpo de pluraj anoj de la loka esperantista grupo, enhavis diverstemajn kulturajn distraĵojn.

Sur la eldona kampo oni daŭrigis la ĝisnunan politikon, tiel ke jam aperis 2 kursotekstoj de SUK-76, kvin pliaj estos baldaŭ eldonitaj kaj kvar lastajn oni preparas.

Kaj estonte? Oni multe diskutis pri la estonteco de SUK. Kvankam ĉiuj partoprenintoj konsentis pri la neceso de tia ĉi manifestacio en la esperantlingva medio, ili bedaŭris, ke nur malmulte da personoj havis la eblecon ĉeesti. Krom vizitantoj, entute sekvis regule la kursojn 22 personoj el 7 landoj. Oni tamen aldonu, ke pluraj pliaj interesitoj ĉeestis unuopajn lekcionojn. Leviĝas la demando: ĉu havas sencon, ke la lekciistoj dediĉu tiom da tempo kaj energio al efektivigo de kursoj por tiel malgranda nombro da personoj, dum aliflanke, ekzemple la kursotekstoj de SUK havas multe pli da sukceso.

(Koncizigita komuniko de la SUK-Estraro)

Kalendaro

Novembro

- 04 30-jara jubileo de la ekzisto de Unesko
- 19-21 Seminario "Lingvo kaj regiona politiko", Bad Münstereifel, FR Germanio (KER, Riouwstr. 172, Den Haag, Nederlando)
- 24-28 Laborkonferenco pri interlingvistiko, Paderborn, FR Germanio (Eŭropa klubo, Riemkestr. 62, D-4790 Paderborn)

Decembro

- 08-12 Unua Kolombia Kongreso de Esperanto, Medellín, Kolombio (Antiokia Esperanto-Ligo, Poŝtkesto aera 52426, Medellín)
- 10 Tago de Homaj Rajtoj
- 15 Tago de la Esperanta Libro
- 15 Zamenhof-Tago (LLZ naskiĝis en 1859)
- 26-29 Seminario pri Esperantaj lingvo kaj literaturo en la kadro de MLA-kunveno, Nov-Jorko, Usono (Modern Language Association, 4 Washington Place, New York, N.Y. 10003)
- 26-02 01 1977 Dua internacia seminario de Sarlanda Esperanto-Ligo, Neustadt/Weinstr., FR Germanio (SEL, Franz-Schubert-Str. 26, D-6602 Dudweiler)

- 26-05 01 1977 20a Skiferio, Adelboden, Svislando (KCE, Postiers 27, CH-2300 La Chaux-de-Fonds)
- 27-03 01 1977 20a Internacia Seminario de GEJ, Nieste, FR Germanio (H-D. Platz, Maikammerer Str. 21, D-6731 St. Martin)
- 28-01 01 1977 Novjara renkontiĝo, Pamporovo, Bulgario (Distrikta E-Komitato, Poŝtkesto 30, Smoljan)
- 28-02 01 1977 6a Vintra E-Feriado, Budapeŝto, Hungario (BTK de HEA, Poŝtkesto 153, H-1443 Budapeŝto)
- 31 Kotizoj de la Universala Kongreso altiĝas

Januaro 1977

- 04-08 42a Nov-Zelanda Kongreso, Auckland, Nov-Zelando (Wood, 24 Stewart Rd., Mt. Albert, Auckland 3)
- 21-29 Internacia Skisemajno, Les Gets, Francio (AFCE, 1 bis, rue d'Athènes, F-75009 Paris)

Februaro

- 20-26 Semajno de Internacia Amikeco

NOVA KALENDARO aperos en la februara aŭ marta numero de la revuo. Ni bonvenigas informojn pri venontjaraj internaciaj aranĝoj: dato, nomo de la aranĝo, loko, lando, adreso por pliaj informoj.



La 47a Itala Kongreso de Esperanto (Massa, de la 18a ĝis la 24a de septembro ĉ.j.), kun preskaŭ 700 partoprenintoj, el kiuj ĉ. 100 venis el dudeko da aliaj landoj, estis unu el la plej multnombraj naciaj E-kongresoj lastatempe. Sur nia foto (sendita de s-ro K. Greutert) parto de la kongresanoj pozas por komuna memoraĵo pri la agrabla kaj sukcesa renkontiĝo.

Loke

Irako

- Jam la duan sinsekvantan jaron, s-ro H.M. Al-Amily, dumviva membro de UEA, aranĝas apartan Esperanto-standon en la Internacia Foiro de Bagdado (de la 1-a ĝis la 21-a de oktobro ĉiujare).

Koreo

- Kun ĉefe junaj partoprenantoj, la 10an de oktobro en Seŭlo okazis Korea Kongreso de Esperanto. Inter la partoprenintoj estis ankaŭ f-ino K. Kikuŝima el Tokio kaj d-ro U. Lins el Kolonjo (li salutis nome de UEA), kiuj havis duonhoran intervjuon pri Esperanto en unu el la tutlandaj radio-programoj.

Soveta Unio

- La ĉefdelegito de UEA, s-ro Boris Kolker, organizis antaŭ kelkaj monatoj tre vastan informan kampanjon pri Esperanto en universitataj medioj. En la kadro de la kampanjo, Esperanto-klubo de Ufa dissendis al

270 universitatoj kaj altlernejoj materialojn pri la eduka valoro de la Internacia Lingvo. La cirkulero enhavis promeson pri senpaga disponigo de Esperanto-lernolibro, laŭ oficiala peto de katedraj estroj. La rezultoj de la kampanjo superis ĉiujn atendojn: 83 universitatoj kaj aliaj altlernejoj reagis favore kaj petis lernolibron.

Bulgario

- Antaŭ kelkaj monatoj, la loka Esperanto-societo "Lumo" en Tarnovo estis distingita per grava ordeno, lige kun sia 80a datreveno kaj pro "multjara populutila agado". En antaŭaj jaroj similan distingon ricevis ankaŭ la societoj en Plovdiv kaj Ŝumen, Bulgara Esperantista Asocio, ĝia organo *Bulgara esperantisto* kaj pluraj unuopaj aktivuloj.

Israelo

- *Israelo 1976* nomiĝas 16-paĝa informa broŝuro pri la lando. Ĝi enhavas informojn pri la diversaj aspektoj de la vivo kaj turismaj vidindaĵoj en Israelo. La broŝuro estas akirebla kontraŭ unu int. resp. kupono ĉe la eldoninto: Esperanto-Ligo en Israelo, P.k. 39004, Tel-Aviv 61390.

Hinda Unio

- S-ino M. Haudebine, honora membro de UEA, tuj post la Kongreso en Ateno revojaĝis al Hinda Unio, kie ŝi pasigis 15 jarojn instruante Esperanton. Post restado en la nordo, ŝi nun vojaĝas tra la suda parto de la vastega lando kaj helpas vigligi la laboron de pluraj jam ekzistantaj Esperanto-rondoj tie. Fine de septembro, s-ino Haudebine partoprenis la inaŭguran feston de la Esperanto-klubo en Indore, kies prezidanto fariĝis s-ro M.A. Vyas (17/6, Choti Gwaltoli, Indore-452 001, M.P.). La klubo havas 21 membrojn. Donaca alsendo de lerniloj kaj informiloj estas bonvena.

Bolivio

- Atingis nin la unua numero (septembro 1976) de *Bolivia esperantisto*, laŭ sia subtitolo, "monata bulteno de la Nova Bolivia Esperanto-Ligo". Temas pri simpla sed plaĉa 4-paĝa dulingva (Esperanto kaj la hispana) stencilajo, kiu informas pri fondiĝo de la landa organizaĵo. Ne estas troveblaj multaj aliaj detaloj en la bulteno, kiun prizorgas s-ro José Roberto Arze, Casilla 6118, La Paz, Bolivio.

ISU en Rejkjaviko

- En la kadro de la 62a UK en 1977 okazos la 30a sesio de la Internacia Somera Universitato. Universitataj profesoroj kaj aliaj kvalifikitaj personoj povas proponi prelegojn al la Komisiono pri ISU, 2, bd. de Douai, F-59100 Roubaix, Francio. La proponoj (kun resumo de la prelego, mallongaj biografio kaj bibliografio kaj foto de la prelegonto) atingu la Komisionon antaŭ la 15a de januaro 1977.

Kongresoj

- La 44a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj, okazinta fine de julio en Stubenberg (Aŭstrio), akceptis kvin rezoluciojn, en kiuj oni pledas por plia instruado de Esperanto en porblindulaj lernejoj, por radio-elsendoj en la Internacia Lingvo, por subteno al la klopodoj brajl-igi Esperantajn verkojn, por rabatitaj vojaĝeblecoj de blinduloj kaj akompanantoj ankaŭ en la internacia trafiko, kaj por elimino de blindula senlaboreco pere de organizita faka trejnado. La rezolucioj aperis samtempe en Esperanto kaj en germana kaj angla tradukoj.

Reklamado

- La monda fotografia entrepreno Agfa-Gevaert eldonis malgrandan serion de diapozitivoj, kun akompana sonbenda teksto en la Internacia Lingvo. Temas pri Agfa-Gevaert ĝenerale kaj pri ĝia produktosortimento. Organizantoj de internaciaj renkontiĝoj, ekspozicioj k.s. povas senpage pruntepreni la serion ĉe: Agfa-Gevaert N.V., Reclame en Redactie, Septestraat 27, B-2510 Mortsel, Belgio.

Informado

- Se juĝi laŭ la ĝisnunaj atingoj, okazigo de la 62a UK en Islando montriĝos modele utiligita okazo por informi la ĝeneralan publikon pri la Internacia Lingvo. Krom la aperigo de la islanda eldono de la konata seslingva faldfolio kaj produkto de pluraj gazetaraj bultenoj, kiujn la islandaj ĵurnaloj abunde ekspluatis, oni jam aranĝis televidan kaj plurajn tre ampleksajn intervjuojn en preskaŭ ĉiuj gravaj

islandaj gazetoj. Fine de septembro denove aperis dupaĝa, riĉe ilustrita (5 fotoj!) intervjuo kun Baldur Ragnarsson en la ĵurnalo *Thjóðviljinn*. Temis pri la partopreno de la prezidanto de la rejkjavika LKK en la Kongreso en Ateno.

Periodaĵoj

- Ĝus aperis *Kontakto*, n-ro 48, la lasta el la jarkolekto 1975. La 24-paĝa lingvistika numero enhavas nur 3 ampleksajn kontribuojn, kiuj estis prelegoj en la 19a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo: "Ĉu ideala sonsistemo?" (Tibor Vaskó), "Lingvistiko kaj arto" (Giorgio Silfer) kaj "Esperanto — ĉu eŭropa lingvo?" (Hartmut Trunte). Kiu ne abonas la revuon de TEJO (ĉi-jare 13,-; venontjare 15,- gld.), povas aparte aĉeti ĉi tiun n-roon por 3,- guldenoj ĉe la Libroservo de UEA, sed necesas ja kombini kun libromendo por atingi la minimuman mendosumon.
- La ĉi-jara kajero de *Sennacieca revuo* liveras denove bonvenan legomaterialon. Enkonduke troviĝas artikolo de G. Lagrange pri "Lanti post du generacioj", kiu grandparte

— laŭ propra konfeso — dediĉas sin al "utopiaj forŝveboj"; oni prefere legu ĝin paralele kun la — recenzota — verko *Vivo de Lanti* de E. Borsboom. Sekvas i.a. la hamburga ISU-prelego de P. Neergaard pri ekologiaj problemoj, kontribuado de S. Aarse ("La inerto de la homa spirito"), luda leciono pri matematiko kaj humura rakonto. Aparte leginda, ĉar klopodanta juste pesi fortojn kaj erarojn de pridisputata verkisto, estas la artikolo pri Solĵenicin plume de, ŝajne, jugoslavia aŭtoro.

Medicino

- Simpla recepto de la dieto-terapio Moerman (prononcu: Murman) kontraŭ kancero nun estas akirebla ankaŭ en Esperanto. La dieto-terapio Moerman ĝis nun altiris atenton de multaj kancerpacientoj en Nederlando. Oni povas — kun respondokupono — peti pri "Resuma informo pri la dieto Moerman" ĉe: Sekretario de "Amnestie", Oranje Nassaustr. 15, Elst (Geld.), Nederlando.

Literaturo

- En la literatura konkurso por mallonga rakonto, kiun organizis la jugoslavia periodaĵo *Voĉo*, la unuan premion gajnis B. Golden (Hungario), la duan Z. Heide (Danlando) kaj la trian O. Rees (Britio).

Persone

Lins

- D-ro Ulrich Lins, komisiito pri la eldona agado de UEA kaj unu el la direkciaroj de CED, pro sia profesia laboro estis inter la 15a de septembro kaj la 9a de oktobro en Japanio. Krom pluraj renkontiĝoj kaj interparoloj kun aktivuloj de la Movado en la lando, d-ro Lins prelegis por KLEG en Osako kaj por JEI kaj Rondo Harmonia en Tokio. Li kontribuis ankaŭ en la publika kunveno (ĉ. 250 ĉeestantoj) pri "Lingvo kaj diskriminacio", aranĝita okaze de la 50a datreveno de la jura personiĝo de Japana Esperanto-Instituto.

Gim Sam-Su

- D-ro Gim Sam-Su, profesoro pri ekonomia historio en la Virina Universitato Sukmjong en Seŭlo (Koreo), pretigis sian kelkcentpaĝan historion de la korea Esperanto-

movado. La libro, kies verkadon stipendiis industria fondaĵo (v. nian revuon, majo 1975, p.97), aperos komence de 1977 ĉe prestiĝa eldonejo. La aŭtoro estas tre renoma figuro en la kultura kaj scienca vivo de la lando.

Haltrecht-Matte

- S-ino Merle Haltrecht-Matte fariĝis antaŭ nelonge prezidanto de Kanada Esperanto-Asocio. Ŝi, same kiel ŝia edzo Guy (nun komitatano de UEA) estis ĝis antaŭ nelonge konata aktivulo en TEJO-rondoj. Estante nur 26-jara, s-ino Haltrecht-Matte verŝajne estas la plej juna prezidanto de relative granda landa asocio. Interese estas, ke ankaŭ aliajn gvidajn postenojn en KEA okupas virinoj: Erna Sheppard estas vicprezidanto, Alice Tuch sekretario kaj Louise Labelle kasisto.

N-ro 501, 1976 09 30

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

BELG: C. Declerck.

SOCIETO ZAMENHOF 1976

JAP: 202 K. Sumiyoshi. US: 203 B. Garrett; 204 C. Peterson; 205 R. R. Schmitt; 206 M.A. Walker. FRG: 207 K. Schönrich. US: 208 T. A. Goldman; 209 M. Gerson; 210 A.S. Casey; 211 A. Estling. JAP: 212 S. Yamazoe; 213 Y. Isobe; 214 I. Yamaga. FINN: 215 H. Alikoski. NED: 216 M.G. Schoutens-van Lammeren.

SOCIETO ZAMENHOF 1977

US: 2 B. Garrett. JAP: 3 Hideo Shinoda; 4 Seiji Kato. NED: 5 Lawrence Mee; 6 A.C.E. Childs-Mee. FIN: 7 Vuokko Heinäsuo. US: 8 Doris Vallon; 9 Sidney V. Steinberg; 10 Paul Stein.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al la artikolo 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA, ni publikigas ĉi-sube la nomojn de la nove nomitaj delegitoj de UEA. Se ĝis la dato 1977 01 15 neniun membro pro grava kaŭzo protestos, la nomigo fariĝos valida.

BELG: M-Th. Henquinez, FD (arto: ceramiko), Leuven. FRANC: André Masclet, D kaj FD (astronomio), Antibes. FRG: Leo Funken, FD (turismo), Bad Ems; Gary Mickle, VD, Berlin; Klaŭdo Trésorier, FD (pasporta servo de TEJO, SOS-aŭto-servo), Göttingen; Hermann Schroeder, D kaj FD (turismo), Lüneburg; Hans Dieter Wilhelm Goeres, D kaj FD (energetikoj, fiziko meĥanika kaj hidrodinamika, komerco), Mönchengladbach; Ulrich Brandenburg, D kaj JD, Münster;

Alexander Starke, FD (filatelo), Nürnberg; Dieter Kleeman, FD (medicino), Rastatt-Niederbühl; Eberhard Ackermann, D kaj FD (komerco, turismo), Schweinfurt/M. ITAL: Carmelo Cimino, FD (edukado-didaktiko, lingvo-instruado), Roma. REUNIO: André Grondin, D, Saint Joseph. SOV: Naum Sigal, VD, Odessa.

NE PLU VALIDAS

(pro adresŝanĝoj aŭ aliaj kaŭzoj) la informoj pri la jenaj delegitoj en la Jarlibro 1976:

BELG: Antwerpen, la FD (fervojoj). BRIT: Bradford, la D. FRANC: Annemassee; Antony. FRG: Bad Hersfeld, la FD (maŝinkonstruado); Bremen, la FD (turismo); Düren;

Muggensturm; Soest. ITAL: Roma, la FD (sociaj aferoj). NORV: Bergen, la VD. SUD-AFR: Johannesburg, la FD.

DONACOJ 1976 (Gld.)

FONDAĴO CANUTO: FR Germanio: Rudolf Petri 16,30. Svedio: David Sandström 3,75. Sumo ĝisnuna 4 949,32.

ĜENERALA KASO: Anonime: 50,00. FR Germanio: M. Klünder 110,00. Sumo ĝisnuna 4 225,78.

PATRONAJ MEMBROJ DE TEJO, 1976: 15 L. Oterma, Finnlando; 16 H. Lafargue, Francio; 17 R. Triolle, Francio; 18 H. Behrmann, FR Germanio; 19 W. Th. Oeste, FR Germanio; 20 Bruno Ostropolski, Italio; 21 Ĝ. Harabaĝiu, Usono.

PATRONA MEMBRO DE TEJO, 1977: 1 R. Shpan-Gabrielith, Israelo.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

ekzameno
e Redaktas: B. Golden,
Csikász u. 11.III.3
H-8200 Veszprém, Hung.

RESPONDO 5

(pri la demando v. nian oktobran numeron, p. 173)

PAUL NYLÉN (1870-1958). Li estis sveda ĵurnalistoj, redaktoro de la gazeto de la sveda asocio de polisticoj kaj de granda ĵurnalo en Stokholmo. Li estis unu el la pioniroj de la sveda Esperanto-movado. En 1892 li esperantistiĝis kaj la sekvan

jaron fariĝis ano de la Klubo Esperantista en Uppsala, la dua en la mondo. Li kunlaboris al *Lingvo Internacia* ekde 1895, kiam ĝi estis lanĉita en Uppsala. De 1897 ĝis 1901 Nylén servis kiel ĉefredaktoro de ĉi tiu revuo. Li redaktis ankaŭ la revuon de la sveda landa asocio, *La Espero*, inter 1918-1920 kaj en 1927. Li fariĝis membro de la Lingva Komitato en 1905 okaze de ĝia fondiĝo dum la Unua Universala Kongreso. Li estis akademiano en 1908 kaj vicprezidanto de la Akademio en 1933.

PAUL LENGYEL (1868-1932). Li estis hungara presisto en la urbo Szekszárd. Tuj post sia esperantistiĝo en 1897, li kontaktiĝis kun la anoj de la klubo en Uppsala. En 1900, kiam la revuo *Lingvo Internacia* estis minacita de ĉeso, Lengyel transprenis ĝian eldonon kaj presadon, poste ankaŭ la redaktadon. En 1904 li iris kun sia familio al Parizo kaj tie fondis kune kun Paul Fruictier kaj Théophile Cart la Esperanto-eldonejon Presa Esperantista Societo. Li redaktis ankaŭ *Juna Esperantisto* de 1909 ĝis 1914. Li fariĝis ano de la Lingva Komitato en 1905 kaj akademiano en 1910.

PAUL FRUICTIER (1879-1947). Li estis franca kuracisto, kiu redaktis francajn medicinajn gazetojn. Li lernis Esperanton en 1900 kaj estis

Vi povas helpi la laboron de la CO de UEA pagante por 1977 frue vian kotizon

gvidanto de la Grupo de Parizo. Li fariĝis unu el la kunfondintoj de Presa Esperantista Societo, kiam Paŭlo Lengyel venis al Parizo. De 1902 ĝis 1907 li estis ĉefredaktoro de *Lingvo Internacia* kaj, krome, redaktis *Internacia Scienca Revuo* (1904-1911) kaj *Internacia Medic-*



ino (1910-1911). Li verkis librojn pri la sintakso kaj vortfarado de Esperanto. Li estis elektita ano de la Lingva Komitato en 1905.

PAUL BERTHELOT (1881-1910). Li estis franca presisto kaj eldonisto. Li esperantistiĝis en 1889 kaj dum la sekvaj jaroj fondis kaj mem presis gazetojn kaj revuojn. Li aperigis la unuan Esperantan gazeton en la kataluna lingvo, *Espero de Katalunjo*. Li estis unu el la iniciatintoj de la socialisma *Internacia Socia Revuo*, kiu aperis en 1907. En 1905 li fondis la revuon *Esperanto* kaj en 1907 li vendis ĝin al Hector Hodler. Tiu ĉi faris ĝin la oficiala organo de UEA okaze de ties fondiĝo la sekvan jaron. Berthelot fariĝis membro de la Lingva Komitato en 1909. Antaŭ sia morto en katolika misiejo en Brazilo, li komencis verki latinlingvan lernolibron de Esperanto.

PAUL NEERGAARD (1907-). Li estas dana agronomo, specialisto pri malsanoj de plantoj. Lia esperantistiĝo datiĝas de 1925. Li estis ĉefredaktoro de la grava fakrevuo *Esperantologio*, kiu aperis en 1949-1955 kaj 1959-1961. Li redaktis *Sciencaj Studoj* (1958), verkis artikolojn pri terminologiaj problemoj en Esperanto kaj publikigis popularsciencajn verkojn pri botaniko verkitajn originale en Esperanto. Nuntempe li estas vicprezidanto de la Akademio de Esperanto.

DEMANDO 6

(la respondo aperos en nia decembra numero)

Dum kunveno de la loka Esperanto-klubo de Verdurb, oni pritraktis la nuntempan kulturan vivon kaj informis la anojn, kie ili povas ricevi pli da detaloj. S-ro Fuŝfuŝ ne tro zorge atentis kaj, kvankam li ĝuste skribis la adresojn, li intermiksas la temojn. En kolumno A estas la adresoj kaj en kolumno B la temoj. Ĉu vi povas reordigi ĉi-lastajn por ke ili estu apud la ĝustaj adresoj?

A	B
a) Hofburg, Wien, Aŭstrio	Internacia Kongreso 1976, Gotenburgo, Svedio
b) Poŝtkesto 46, 00 950 Varsovio, Pollando	Someraj studperiodoj en kultura domo
c) Rue de la Reinette 13, Bruselo, Belgio	Esperanta biblioteko kaj muzeo
ĉ) 67, avenue Gambetta, F-75020 Paris	Regulaj radioelsendoj en la Internacia Lingvo
d) F-49150 Baugé, Francio	Duonmonata Esperanto-gazeto

LA TORNISTRO — bona distro —, duonjara revuo, literaturaĵoj, diversaj aĵoj. Abono 1976-77-78: 12 gld. Antaŭa trijara kolekto: 12 gld. Mendu ĉe UEA.

Klubo Esperantista de Skövde kune kun porinfana bonfara organizo "Savu infanojn" en Tibro, Svedio, aranĝos internacian ekspozicion de infanaj desegnaĵoj kaj pentraĵoj. La temo estas: "Libera motivo el mia hejmloko." Ekspoziciaĵoj estu senditaj al: Rädde Barnen, S-ino Lisbeth Lundberg, Bjurslingan 2, S-543 00 Tibro, Svedio, ĝis la 15a de januaro 1977. Inter la sendintoj estos lotitaj premioj en formo de svedaj popolaj memoraĵoj kaj paketoj de poŝtmarkoj. **Alvoko al esperantistoj:** Faru ĉion por sukceso de la ekspozicio! Propagandu!

Kvitancoj en la internacia lingvo, por ĉiu kasista bezono. Mendeblaj ĉe UEA. Informoj haveblaj de Mondkomerca Eldonejo Esperantista, Poŝtkesto 25041, Rotterdam-3003, Nederlando.

Malnovaj Esperanto-revuoj interesas min: Ramon Molera, Moyá (Barcelona), Hispanio.

Necesa por ĉiu esperantisto! *Pri internacia lingvo dum jarcentoj* (2-a eldono), ĉirkaŭ 350 paĝoj, 660 nomoj! Favana prezo ĉe antaŭmendo: 25 guldenoj aŭ egalvaloro kun afranko. Mendu ĉe Isaj Dratwer, Bat Jam, poŝtkesto 3396, Israelo.

Transkontrolo de tradukado. Kunlaborantoj, uzante sole gepatran lingvon kaj Esperanton, jam malkovris seriozajn kaj ridindajn erarojn en komercaj nacilingvaj tradukoj. Volontuloj ĉiulandaj faru gravegan laboron! Informas: Briscoe, 19 Moorland Road, Harrowgate, Anglio.

Lerneja Esperanto-Grupo serĉas gekorespondantojn (14-16-jaraj) en Eŭropo. Skribu al: S-ro Nutton, South Craven School, Cross Hills, Keighley, Anglio, BD20 7RL.

Esperantistaj kolektantoj: Senpaga registrado en niaj listoj tutmonde disvastigataj. Detaloj, klarigoj kontraŭ IRK. R. Melo, 34 Av. Russie, F-03700 Bellerive, Francujo.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,75 gld. (1 internacia respondkupono). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj.

S-ro Ghassan Mohammed Al-Mawsili, Tariq Al-Mawsili's House, Mawsili and Dalitya Building No 7, Sahat Al-Mal'aab, Shimaal Al-Mazraa', Damascus, Sirio, deziras korespondi kun ĉiuj landoj kaj volonte akceptos inform- kaj lern-materialon pri Esperanto.

Eldoniston serĉas: 1) por sia ilustrita memorlibro 55 jaroj per *Esperanto* tra 20 landoj Tib. Morariu; 2) por reeldono de novelaroj el la rumana literaturo: M. Sadoveanu: *Nobela peko* (aperis en 1929); Bratescu-Voinesti: *Niĉjo mensogulo* (1927); Emil Isac: *Sonorilo kaj kanono* (proza poemaro, 1930). Ĉiuj tradukoj premiitaj de la Akademio de Esperanto. Bonvolu sendi ofertojn al: Tiberio Morariu, Götaforsväg. 1, S-124 30 Stockholm-Bandhagen, Svedio.

SE VI SERĈAS SERIOZAJN KORESPONDANTOJN, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo), turnu vin al la KORESPONDA SERVO de UEA. Adreso: K.S.M., 12 rue des Jacobins, F-63000 Clermont-Ferrand, Francio.

Paŭlo kaj Stefano

La sekreta vivo de la du gravaj disĉiploj de la naskiĝanta Kristanismo, laŭ romano de spirito vivinta en tiu epoko, psikografie verkita de brazila mediumo Francisko Cândido Xavier.

Tiun kaj aliajn gravajn verkojn vi povos ricevi, se vi aliĝos al

SPIRITA ELDONA SOCIETO F.V. LORENZ
Poŝtkesto 3133 – Rio de Janeiro – Brazilo

La 5-an de oktobro mortis en Poděbrady, Ĉeĥoslovakujo, **Francisko PYTLOUN**, esperantisto de 1921, multjara membro de UEA kaj pluraj aliaj E-organizaĵoj, ĉiam strebanta laŭ Zamenhofa idealo disvastigon de Lingvo Internacia.

Okaze de la Libro-Tago –

Se vi vere
ne scias,

kion donaci al persono, kiu ion meritas, pensu pri Donaca Karto de la Libroservo de UEA.

Vi pagas 5 guldenojn (aŭ egalvaloron), plus la sendokostoj 10%, kaj ricevas specialan karton, kiun vi plu-sendas – kun viaj varmaj bondeziroj, kompreneble – al tiu favorat(in)o.



Ŝi (aŭ li) povos tiam aĉeti laŭ propra elekto iun ajn libron aŭ diskon aŭ abonon ĉe la **Libroservo de UEA**.

HEROLDO DE ESPERANTO

LA PLEJ POPULARA SENDEPENDA INTERNACIA ESPERANTO-ORGANO

De 55 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 17 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Kultura paĝo pri literaturo, arto, muziko, sporto, kinoarto, ktp.
- Duobla Kongresa numero
- Libera Tribuno de la legantoj
- Literatura kaj scienca suplementoj

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA

Jarabono: 370 belgaj frankoj aŭ egalvaloro.

Mendu provnumeron ĉe la Redakcio: **Rue de la Reinette (Pippelingstraat) 13, boîte 28, Bruselo 1**

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska

EL POPOLA ĈINIO

Sinteza monata gazeto en Esperanto, ĝustatempe prezentanta al la legantoj la sukcesojn de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de Ĉinio, ĝiajn kulturon, artojn, socian vivon kaj fundamentajn sciojn pri ĝiaj lando kaj historio. Ĝi estas gazeto populara kaj riĉe ilustrita.

Abonu ĝin geesperantistoj de ĉiuj landoj!

1 jaro	£0.90	\$2.20	Ff10.00	DM 6.00	Gld. 6.00
2 jaroj	£1.35	\$3.30	Ff15.00	DM 9.00	Gld. 9.00
3 jaroj	£1.80	\$4.40	Ff20.00	DM12.00	Gld.12.00

Abonu ĉe UEA aŭ nia peranto en via lando aŭ rekte ĉe la Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN, P.O. Kesto 313, Ĉinio.

Specimeno akirebla senpage laŭ peto.

Noto: Abonante ĉe UEA nederlandanoj aldonu 4% por enlanda imposto.

Ekzistas loko por

sekretari(in)o

en la Centra Oficejo en Rotterdam, en la kadro de la Volontula Servo de UEA.

Kandidatoj devas esti minimume 18-jaraj kaj maksimume 29-jaraj. La servo-periodo estas maksimume 1 jaro. Estos pagataj la nuraj restadkostoj (loĝado, manĝado), asekuro kaj eventuale parto de la vojaĝkostoj. Ekdeĵoro iam ajn.

Estas bezonataj bona scipovo de Esperanto, precipe skribe, kaj rapida tajpkapablo. Oni devas esti preta tajpi leterojn laŭ diktomaŝino kaj mem trakti leterojn laŭ simplaj instrukcioj.

La sukcesa kandidat(in)o havos okazon funde konatiĝi kun la aktuala stato kaj organizo de la monda Esperanto-movado kaj eventuale povos akiri praktikan sperton ankaŭ pri aliaj oficejaj laboroj.

Petu demandaron de la Centra Oficejo.

Plena vortaro donace


Dank' al heredaĵo de s-ro Ralph Bonesper, antaŭ kelka tempo forpasinta en Nov-Jorko, la Libroservo de UEA povas nun distribui al esperantistoj en landoj kun transpagaj malfacilaĵoj kelkdekon da ekzempleroj de *Plena vortaro* kaj eventuale ankaŭ kelkajn ekzemplerojn de *Plena ilustrita vortaro*.

Personoj, kiuj ne posedas la verkon *Plena vortaro*, bonvolu sendi poŝtkartan peton al la Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Oni bonvolu noti, ke ĉi tiu donaco ne celas komencantojn, sed personojn, kiuj celas perfektigon en la lingvo kaj eventuale bezonas la vortaron pro sia laboro por aŭ en la Internacia Lingvo. Krome, petantoj bv. ne atendi korespondadon pri sia peto, ĉar, se ĝi ricevos pozitivan trakton, ilin ja atingos la libro mem.

Librotenisto

La Centra Oficejo de UEA en Rotterdam serĉas novan libroteniston por baldaŭa enoficiĝo. Salajro dependos de sperto kaj kvalifikoj. *Bezonataj:* adekvata scio de Esperanto, kompreno de la klasika sistemo de librotenado, sperto kun libroten- kaj kalkul-maŝinoj. *Krome dezirata:* kapablo memstare kompili bilancon. *Petu detalan respondilon ĉe la direktoro de la C.O., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Tel. (010) 36 15 39.*



Librotena maŝino en la Centra Oficejo